

19039/1959

# El Popola Ĉinio

Esperanto

人民中國報  
道


東風和暢人間春，  
不要氣彈要的平。  
一九五八年 畫如



1

ELDONAS: ĈINA ESPERANTO-LIGO

1950



## KLOPODADO POR PLI ABUNDA RIKOLTO EN 1959

1. Anoj de Ĉangbaj-komunumo, Gilin-provinco, niveligas deklivajn kampojn.
2. Anoj de Vejhing-komunumo, Gansu-provinco, profunde plugas kaj po-tavole sterkas siajn kampojn.
3. Trempo utilas al la selektitaj semoj kontraŭ malsanoj.
4. Vastaj kampoj de Hjuŝuj-komunumo estas prizorgataj kiel ĝardeno.
5. Semado sur kampo komunuma.
6. Kompletiga resemado sur kampo de Guodu-komunumo, Ŝenhi-provinco.

(Fotoj de Hinhua-novajservo)



# 10,700,000 tunoj da ŝtalo

**E**N la granda impetado de socialisma konstruado de Ĉinio aperis multaj mirakloj, inter kiuj gravan lokon okupas la superplenumo de la produkto-tasko de 10,700,000 tunoj da ŝtalo en 1958. Statistiko publikita de la Metalurgia Ministrejo anoncas, ke jam 10,730,000 tunoj da ŝtalo produktiĝis de la jarkomenco ĝis la 19-a de dec. 1958, kaj en la tuta jaro produktiĝos sume 11,000,000 tunoj.

La cifero de 10,700,000 tunoj estas banala inter la jaraj ŝtalproduktaj ciferoj de diversaj landoj. Tamen, se ni farus historian esploron pri tiu ĉi cifero, ni ektronus la eksterordinaran signifon de tiu ĉi cifero banala.

La produkto de ŝtalo estas la fundamento kaj mezurilo de industrio de ĉiu lando. Antaŭ la liberiĝo, sub la jugo de la imperiistoj, Ĉinio ne

povis disvolvi kaj sekve ankaŭ ne povis ekhavi propran potencon industrion. De la jaro 1890, kiam la imperiestro de King-dinastio ekkonstruis ŝtal-industrion, ĝis la jaro 1949, kiam Ĉiang Kaj-ŝek estis forpelita de la kontinento, malnova Ĉinio produktis entute nur 7,600,000 tunojn da ŝtalo en la 59 jaroj. Kaj la plej alta jarprodukto en 1943, inkluzive la ŝtalon produktitan en Nordorienta Ĉinio tiam okupata de la japana imperiisto, estis nur 920,000 tunoj. Sed nun nia jar-produkto jam atingis 10,700,000 tunojn, 40% pli multe ol la tuta produktokvanto de la 59 jaroj de malnova Ĉinio.

Kaj la cifero 10,700,000 tunoj signifas krome, kaj pli grave, en kia rapideco kreskas la ŝtal-industrio de Ĉinio. En la jaro 1957, Ĉinio produktis 5,350,000 tunojn da ŝtalo. Do la 10,700,000 tunoj estas ĝuste duoblo de tiu kvanto. Tiel rapida kresko ja estas senprecedenca en la monda historio de ŝtalindustrio.

Dum la periodo de la Unua Kvinjar-plano (1953-1957), la ĉina ŝtal-produkto kreskadis en la

## EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Kultura Gazeto  
Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
Adreso: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

### Enhavo de 1959 N-ro 1 (52)

*Bildo sur la kovrilo — La Kolomoj Alflugas*  
(Pentris Giang Ĝaŭ-he)

**Malpeza industrio en popolaj komunumoj**

**Vizito al Panju-gubernio**

**Grandioza himno internaciisma**

**La Popola Komunumo de Hjuŝuj**

**Al la pinto de tekniko**

**Nova ferŝtala bazo en Vuhan**


**La brila ĉina medicino kaj farmacio**

**Tipa ekzemplo**

**La kulturo de la Epoko de la Militantaj Regnoj**

**Kurso de ĉina lingvo**

*Bildo sur la dorsa kovrilo — Granda Impeto en Fiŝprodukto* (Pentris Ŝeng Ci-gjun)



meznombra rapideco de 31.7%, pri kiu oni dubis en la komenco sed poste admiris kun miro. En tiuj kvin jaroj, la ŝtalprodukto kreskis je 4,000,000 tunoj, sed la jarprodukto de 1958 sole jam multe superis tiun de la jarkvino. Tiu statistiko montras al ni, ke la cifero de 10,700,000 tunoj markas




Vu Zuo-ĵen :

## Ĉielen kaj Oceanen

*Jen ruĝa raketo el la Oriento  
leviĝas brilante tra la firmamento.  
Ĝi fulmorapide tra l' kosmo veturas,  
post lunon-vizito, la sunon alkuras.  
Oĉj' Sam l' Okcidenta eksentu hont-pikon,  
ke liaj raketoj enplunĝis Pacifikon.*

Trad. Laŭlum



novan etapon de ĉina ŝtal-produkto post la liberiĝo. Alia karakterizajo de la ŝtalproduktado de Ĉinio en 1958 estas tio, ke disvolviĝis tra la tuta lando amasa ŝtalprodukta kampanjo de samtempa impetado de modernaj ŝtalproduktaj entreprenoj kaj malgrandaj ŝtalproduktejoj produktantaj per malnovaj metodoj. Tiu ĉi kampanjo solvis problemojn, kiujn oni ne povis solvi sole per disvolvo de modernaj grandaj entreprenoj en ŝtalprodukto kaj likvidis la asertojn de skeptikuloj kaj pesimistoj ke "Ĉinio ne povas rapide industriiĝi" k. s. Kaj krome, la impetado de ŝtalprodukto sekvigas konforman disvolviĝon de la koncernaj industrioj de maŝinfarado, karbominado, komunikado, geologia esplorado, elektroprodukto k.t.p., kaj pretigas necesajn kondiĉojn por impetado de aliaj industrioj.

Nun, la ŝtalprodukto de Ĉinio daŭre kreskadas por sukcese plenumi a ŝtal-produktan taskon de 18,000,000 tunoj en 1959. Kreadi novajn miraklojn super mirakloj jam fariĝis regulo en la socialisma konstruado de la ĉina popolo.



## Malpeza industrio de

Song Naj-de, vicministro

POST la stariĝo de popolaj komunumoj en la kampanjo, oni sentas grandan bezonon ebligi partoprenon de ĉiuj laborfortoj en la produktado, antaŭ ĉio komplete liberigi la virinojn el la hejma mastrumado. Nun la virinoj manĝas en la kolektiva manĝejo, kaj la infanoj estas prizorgataj en la infanvartejoj aŭ infanĝardenoj. Dank' al tio, virinoj forskuis la pezajn ŝarĝojn de kuirado, infanvartado kaj similaj hejmlaboroj, sed parto de la hejmaj laboroj kiuj devas esti plenumataj de la fabriko, pezas ankoraŭ sur la ŝultroj de la virinoj. Ekzemple, ili ofte devas fari ŝuojn dum labor-paŭzoj ĉe kamprando. Kvankam parto de la prilaborado de rizo kaj tritiko estas nun farata per maŝinoj, sed parto ankoraŭ per homaj manoj aŭ per la bestfortoj. Por la 500 milionoj da kamparanoj en la tuta lando pli ol 2,000 milionojn da paroj da ŝuoj kaj pli ol 150 milionoj da tunoj da greno estas bezonataj ĉiujare. Ilia fabrikado kaj prilaborado ja tute ne estas bagatelo.



# EVENTO en Ŝtalprodukta Historio

Ĉinio bezonis nur

**353 tagojn** (1 jan. ĝis 19 dec. 1958)

por kreskigi sian ŝtalprodukton de 5,350,000 ĝis 10,730,000 tunoj

*Usono*

**7 jarojn** (1892-1899) por kreskigi sian ŝtalprodukton de 5,000,000 ĝis 10,810,000 tunoj.

*Britio*

**32 jarojn** (1903-1935) por kreskigi sian ŝtalprodukton de 5,110,000 ĝis 10,020,000 tunoj.

*Germanio*

**8 jarojn** (1897-1905) por kreskigi sian ŝtalprodukton de 5,090,000 ĝis 10,060,000 tunoj.

*Francio*

**29 jarojn** (1923-1952) por kreskigi sian ŝtalprodukton de 5,300,000 ĝis 10,900,000 tunoj.

*Japanio*

**20 jarojn** (1936-1956) por kreskigi sian ŝtalprodukton de 5,220,000 ĝis 11,110,000 tunoj.

## popolaj komunumoj

*de malpeza industrio*

Lastjare abundan rikolton ni havis. La prilaborenda greno estas tiel kolosa en kvanto, ke la ekzistantaj entreprenoj tute ne povos plenumi la laboron ĝustatempe. Se tiu ĉi problemo ne solviĝus, ne nur la vivnivelo de la popolo ne povus esti altigita, sed ankaŭ la entuziasmo por produktado de la kamparanoj estus malhelpota. Kie oni solvu tiun ĉi problemon? En la urboj? Sed tie ne troviĝas sufiĉa produktivo. Krome oni devus tiam transporti la krudmaterialojn tien kaj la prilaboritajojn reen. Tio sendube kaŭzus grandan malfacilon al la jam streĉa transportado. Evidente la plej ekonomia kaj plej efika rimedo estas tio, ke la popolkomunumoj fondu stajn proprajn fabrikojn por utiligi proprajn materialojn kaj kontentigi la lokajn bezonojn.

Kiel rezulto de la riĉega rikolto, la enspezo de la kamparanoj pligrandiĝas. Ili volas aĉeti multe da ĉiutagaj necesajoj en granda kvanto. Oni jam sentas la nesufiĉon de pluraj ĉiutagajoj.

Post kolektiviĝo de laborado kaj vivado, la bezono de horloĝoj multe pligrandiĝas. Almenaŭ du ĝis tri vakuaj boteloj estas bezonataj de ĉiu familio post stariĝo de komunaj manĝejoj, kiuj sen necesigis unuopajn kuirejojn de la kamparanoj. Cetere la kolektiva vivado ankaŭ faciligas kulturan revolucion. En kelkaj popolkomunumoj en Giangsu-provinco oni jam abonis du teoriajn gazetojn por ĉiu grupo de la komunumo. Bezonoj de papero kaj skribiloj k. s. same abrupte pligrandiĝas. Ankaŭ tiuflanke oni ne devas atendi solvon sole de la ekzistantaj produktaj rimedoj en la grandaj kaj mezaj urboj.

Popolkomunumo estas la plej bona organiza formo por transiri paŝon post paŝo al Komunismo, kaj ankaŭ la baza unuo de la estonta komunisma socio. Komunismo likvidos ekonomion bazantan sur komercaĵoj, por ĝi la celo de produktado estas rekta konsumado. La produktado de popolkomunumo estas principe tia. Por ke la kamparanoj estu samtempe ankaŭ laboristoj kaj ke la industriiĝo efektiviĝu en la kamparanoj, kaj ke la vilaĝoj transformiĝu en urbojn, despli necesas grandskale kreskigi industriojn en la popolkomunumoj.

Oni povas klare vidi el la supraj rezonoj, ke la popolkomunumoj devas establi industrion. pre-

cipe la malpezan. Tio estas nepra tendenco, kiun nenia forto povas haltigi.

Por establo de malpezaj industrioj, la popolkomunumoj posedas multajn favorajn kondiĉojn: Unue, 80% el la bezonataj krudmaterialoj por malpezaj industrioj troviĝas en la kamparoj t. e. ĉe la popolkomunumoj. Abundas jam la grenoj kaj plimulte da kampoj povos esti dediĉataj al industriaj plantajoj kaj tiam ankoraŭ pli riĉiĝos la krudmaterialoj por malpezaj industrioj. Cetere ĉe popolkomunumoj la bezono de krudmaterialoj estos intime kunigitaj kun la agrikultura produktado, tial industriiĝo de la kamparoj akcelas disvolviĝon tiel de industrio kiel ankaŭ de agrikulturo. Due, la celo de produkto estas por konsumado kaj nun granda parto de la produktajoj konsumiĝas en la popolkomunumoj. Trie, ili posedas la necesan kapitalon kaj materialojn. Ekzemple en Luvej-popolkomunumo en Ŝandong-provinco pasinta-jare la komuna akumulo atingis 18 milionojn da juaĵoj (proksimume 70,000 Usonaj dolaroj), almenaŭ 3 milionoj el ĝi povas esti investataj en industrion. Koncerne al konstru-materialoj, ekz-e brikoj, tegoloj, lignoj kaj ŝtonoj, ĉiuj popolkomunumoj povas sinprovizi. Kvare, ili disponas labor-forton. Ĉiu komunumo havas dekojn da miloj da labor-fortoj, kies parton oni povas transigi al industrioj, sub unueca direktado kaj akomodado laŭ sezon-ŝanĝoj, precipe por malpezaj industrioj, al kiuj taŭgas ankaŭ virinoj kaj personoj ne tre fortaj.

La granskala starigo de malpezaj industrioj en popolkomunumoj rekte subtenas agrikulturan produktadon kaj samtempe plialtigas la vivnivelon de la amaso. En la komunumoj de Gaŭtang-gubernio en Ŝandong-provinco, establiĝis multaj fabrikoj por farun-muelado kaj vestfarado. Dank' al tio 65% de la loĝantoj de tiu gubernio konsumas farunon kaj vestojn maŝine faritajn. La popolamaso vidis ke la disvolviĝo de industrio alportas al ili pli bonan vivon, formiĝis inter ili alta tajdo de strebado al industriigo. Volontaj investoj, kontribuadoj de materialoj, cedo de neuzataj loĝejoj al fabrikoj kaj amo al fabriko kiel al sia propra hejmo jam estas ĉie renkontataj fenomenoj inter la popolamaso.

Mankon de ekipaĵoj, la popolamaso venkas per siaj propraj manoj. "Ni ekipu nin mem", estas la devizo de la laboristoj. Ekzemple en maŝin-fabriko en Gaŭtang-gubernio, nur du-tri el la laboristoj iam vidis rabot-maŝinojn, sed ili fabrikis unu 8-futan rabot-maŝinon per kelkaj simplaj maŝinoj. Malsufiĉon de teknike kvalifikitaj laboristoj ili ankaŭ venkis, mem edukante novulojn. En Gaŭtang-gubernio, lastjare post la starigo de industrio la nombro de

laboristoj kreskis al pli ol 15,000 inter kiuj pli ol 8,000 estas teknike kvalifikitaj. Ĉar multaj laboristoj lernas fervore la teknikon, kaj la majstroj instruas ne malpli. Tial la laboristoj ellernis ferforĝadon nur en dudek tagoj. Dekok-jara laboristino Jin Kuj-ĵing ellernis dum du monatoj dekunu teknikojn, inkluzive kudradon, ĉarpentadon, muldadon de feraĵoj, manipulon de certaj maŝinoj kaj fabrikadon de ŝtalaj globetoj.

Nun en nia lando ĉie progresas grandskalaj konstruadoj, kaj ĉiu konstrua fronto postulas grandnombran laborforton. Sed ju pli granda estas la streĉiteco de labor-forto, des pli urĝa la mekanikigo de laboriloj kaj grandskala disvolviĝo de industrioj sia-vice.

La popolkomunumoj ne nur devas kaj ankaŭ fakte povas establi malpezajn industriojn, sed kiel? Laŭ mia opinio estas necese ĝisfunde efektiviĝi la principon "establi industrion per la forto de la tuta partio kaj la tuta popolo". En niaj malpezaj kaj manĝajaj industrioj estas multaj bonaj tradiciaj produktometodoj inter la popolo. Ekzemple, la progressa produktometodo de oleo-industrio en la mondo estas la macerada metodo, kiu bezonas benzenon aŭ alkoholon kiel solvilon kaj pli malpli komplikajn ekipaĵojn. Sed la tradicia produktometodo de sezam-oleo de nia lando estas muelado. La oleo eltiriĝas helpate de akvo. La ekipaĵoj estas tre simplaj. Nun tiu ĉi procedo aplikiĝas ankaŭ al oleoprodukto de aliaj materialoj, ekzemple la semoj de arakido, kolzo kaj sunfloro, kaj ekhavis unuajn atingajojn. Tio signifas, ke se ni bone apogas nin al la popolamasoj, se ni povas sagace eltrovi, resumi kaj disvastigi la kreaĵojn de la amaso, per la kolektiva saĝo kaj forto, ni certe povas establi fabrikojn en la popolkomunumoj bone, rapide, ekonomie kaj multnombre.

La direktan de industrioj de popolkomunumoj unu popolkomunumo en Henan-provinco formulis jene: "Industriojn oni entreprenu laŭ disponeblaj materialoj kaj laŭ bezonataj specoj kaj kvantoj." Laŭ praktikado lasttempe, tiu ĉi direkto praviĝas prava. Nur tiel oni povas grandmezure abundigi la produktaĵojn por la socio, kaj plene utiligi la homajn, materialajn kaj financajn fortojn de la komunumoj por pli rapide kontentigi siajn proprajn bezonojn, kaj neniiginte la komercaĵan ekonomion.

Laŭ antaŭaj spertoj por industriigo de vilaĝoj oni devas ĉefe starigi malgrandajn fabrikojn kombinante ilin kun mezgrandaj, kaj apliki la tradiciajn produktometodojn kombinante ilin kun la modernaj, sed unue la tradiciajn. Tio ne signifas, ke establante malgrandajn fabrikojn oni tion faru laŭ modelo de la grandaj, kaj aplikante tradiciajn

produktometodojn oni ne pensu ke ili estas nepre primitivaj. Komencante per malgrandaj fabrikoj kaj per la tradiciaj produktometodoj ja celas konformi al la lokaj kondiĉoj kaj komenci tuj la industriigon. Kaj per tio oni rapide ricevos la ekonomiajn fruktojn por solvi la kontraŭdiron de la postrestiganta produktivo kaj la kreskanta bezono. Se troviĝas necesaj kondiĉoj, oni povas establi en popolkomunumoj ne nur malgrandajn kaj mezgran-

dajn fabrikojn, sed ankaŭ modernajn kaj grandajn. En aplikado de tradiciaj produktometodoj oni devas sufiĉe atenti pri kombinado kun la modernaj. La spertoj de laboranta popolamaso devas esti bone resumataj, ankaŭ la spertojn el fremdaj landoj oni apliku, se ili montras sin konvenaj al niaj kondiĉoj. Koncerne al materialoj ni uzu ĉiajn troveblajn objektojn, ne gravas, ĉu ĝi estas bambuo, ligno, briko, ŝtono, fajenco, ŝtalo aŭ aliaj.

## Vizito al Panju-gubernio

*Verkis Cen Ji, vicĉefministro kaj ministro por eksterlandaj aferoj*

**E**N aprilo ĉijare mi vizitis Ŝungiang-an Agrikulturan Kooperativon en Nejgiang-gubernio, Siĉuan-provinco. La granda ŝanĝiĝo en la kamparo tie, unua-foje ekskuis mian penson. Mi propra-okule vidis batatan kampon kun rikolto de 25 tunoj. La kooperativanoj sciigis al mi pri la aŭtuna rikolto de la lasta jaro, ke la sulkoj sur ĉi tiu kampo estis altaj je 2 futoj, sur ĉiu sulko estis plantitaj ok vicoj da batatoj, kies rampaĵoj pendas sur apogframo kiel arbetaro. La batatoj kreskis amase unu sur alia kiel pagodoj. La neta po-mua rikolto en la lasta aŭtuno superis 25 tunojn. Proksime de tiu kampo mi vidis eksperimentan kampon de sukerkanoj plantitaj en denseco de 20,000 kanoj por produkto de 15 tunoj po muo. Tia produkt-normo, laŭ mi, estis sufiĉe alta en tiu tempo.

Antaŭ mia vizito al Siĉuan, mi ne estis kredema al tia altprodukta eksperimento, kiam mi tion aŭdis en Pekino. Mi estas Siĉuan-ano, kaj mem plantis hejme bataton kaj sukerkanon dum someraj ferioj estante gimnaziano antaŭ 40 jaroj. Tiam la po-mu-a produkto de batato atingis apenaŭ 500 kg. kaj ankoraŭ malpli estis tiu de sukerkano. Laŭ mia persona sperto, estas tre malfacile por mi akcepti la ideon pri la eksperimento, kiu devas realigi subitan kaj tiomoblan eksalton de produkto po areunuo. Sed alveninte al la koncerna kampo mi konvinkigis per miaj propraj okuloj.

Lastatempe, akompanante Princon Sihanouk al Kantono, mi aŭdis, ke en Guangdong-provinco



Sukerkanejo

*Lignogravuraĵo de Gu Juan*

troviĝas altproduktaj eksperiment-kampoj kiuj donos da batato kvincent tunojn, da sukerkano tricent tunojn kaj da rizo dudek kvin tunojn po mu-o, t. e. 75, 45 kaj 3.75 tunoj po aro respektive. Parenthese: la rizherboj estas plantitaj unufoje, sed ne per posta aldono de plantoj el aliaj kampoj. Jen ĝi skuis mian penson la duan fojon. Tial mi entreprenis kun aliaj k-doĵ viziton al Panju-gubernio.

Antaŭtagmeze la 4an de septembro, ni forlasis Kantonon, kaj transpasis dufoje riveron ĝis ni atingis vilaĝon Daŝi-hiang de Panju-gubernio. Ĉi tie la saĝo de la popolamaso disfloras kiel printempa kamparo. Akompanate afable de la partiaj sekretarioj de la gubernia komitato kaj la vilaĝa ĉelo, kaj de agronomiaj teknikistoj, mi unue vizitis al la eksperimenta kampo de batato. Ĝi similas al blue verdaj montetoj kaj ankaŭ al verdaj domoj, la impona aspekto jam min logis de malproksime.

Komence, mi pensis: "Kiom da batatidoj oni devis planti en la kampo por ke ĝi donu rikolton de 500 tunoj po muo? Ĉu troviĝas sufiĉa spaco por tio? Eĉ se tio estus ebla, kie estas la necesa spaco por tiom da batatotuberoj kreskontaj? Post alveno al la loko de eksperimento kaj informiĝo, ĉio fariĝis tute klara kaj mi konvinkiĝis.

Ĉi tie en la eksperimenta kampo de 1.05 mu-oj (=7 aroj) estas faritaj sep teraltajoj, ŝtuparformaj kun alteco de 8 futoj, sur kiuj oni plantis po 6,000 batatidoj, entute 42,000 do. La Kompartia sekretario de la vilaĝa ĉelo klarigis, ke ĉiu batatido jare produktos 12.5 kg. da batato kaj la celita rikolto estos garantiata kaj ke oni alprenos la metodon de intertempaj elfosado de batatoj kaj realplantigo de novaj plantidoj.

En tiu ĉi eksperimenta kampo plene pruviĝas la senkompara krepovo de la popolamaso kaj ilia alta nivelo scienca. La specialaĵoj de la eksperimentado konsistas en utiligo de la spaco, reliefigi la plantsurfacon de la tero kaj preni lokon de la aero. Tiel multe pli ampleksiĝas la areo kaj donas lokon por diskreskado de la granda nombro da batatoj. Sur la ŝtuparforma altaĵo estas aranĝitaj bambuaj subportaj framoj, sur kiuj pendas la densaj rampaĵoj de la plantoj en kvar tavoloj. Tio ne nur evitas ilian desuĉadon de nutraĵo destinita por la tuberoj, sed ankaŭ plivastigas la surfacon por ricevi sunbrilon kaj pli intensigas la fotosintezon\*. La poststerkadon oni faras en difinitaj pozicioj.

\* *Kombinado de akvo kaj gaso de karbona acido ĉe vegetaĵoj pere de sunradioj.*

## Vicprezidanto Ĝu De elkreskigis grandajn kukurbojn

**L**A laborama vicprezidanto Ĝu De kune kun kelkaj laborantoj de la administracio de Ĝongnanhaj (t. e. Mez-suda Lago ĉe kiu troviĝas la Centra Registaro de Ĉina Popola Respubliko) elkreskigis aron da

**Vicprezidanto Ĝu De (la 1-a maldekstre) kaj liaj kukurboj.** *Foto: He Aj-kjun*



vaksaj kukurboj (benincasa cerifera) el kiuj la 5 gigantaj elkulturitaj de la vicprezidanto mem estis elmontritaj en la Ekspozicio de Novaj Atingoj en Scienco kaj Tekniko.

Ĉiutage, post la oficaĵoj, li ofte sin okupas je korpaj laboroj, kulturante vinberarbon, florplantojn ktp. Dum kulturado de kukurboj, li en libertempo regule akvumadis, sterkis kaj sarkadis en la ĝardeno.

Sur la kvar plantoj, kiujn li kulturis, elkreskis entute 18 fruktoj. Unu el la plantoj alportis ses grandajn kukurbojn. Tio estas maloftaĵo. Tiuj kvin ekspoziciitaj pezis kune 112.75 kg. Kaj la plej granda el ili pezis 33.5 kg., kun longeco de 0.8 metro kaj diametro ĉe ĝia plej dika parto de 0.33 metro.



Tiun metodon la vilaĝanoj nomas "injektado", kiu celas ke la tuberoj sin etendu en la lokojn sterkitajn, t. e. antaŭ-fiksitajn. Mi trovas ke tio estas grava novigo en agronomio, kaj ke la rikoltnormo estas atingebla. Eĉ, se anstataŭ 500 oni rikoltos 300 tunojn da batato, tio tamen estos tute senprecedenca sensaciaĵo en agronomio. Kiam la produkto povas esti tiom plialtigata, la areo por kulturado estos grandmezure malpliigebla.

Mi vizitis ankaŭ la du eksperimentajn rizkampojn por alta produkto. Unu el ili por 25 tunoj po muo, estas plantita per junplantoj; la alia por 15 tunoj per rekta semado. En ambaŭ kampoj bone kreskas la rizplantoj. Sur la unua estas plantitaj en ĉiu kvadrata colo 12 ĝis 13 plantidoj, entute pli ol sep milionoj, ne estas paroleblaj pri interspacoj. Dekkelkaj gekomunumanoj tie laŭvice disigas la plantidojn en vicojn per bambuvergoj laŭ la teknika instrukcio por ke ili estu plibone aerumataj kaj sunbrilataj.

Se altprodukta eksperimenta kampo havas signifon sciencan, la grandarea riĉrikolta eksperiment-kampo havas signifon ĝeneraligan. Post vizito al la altprodukta eksperiment-kampo, ni do kun vigla intereso iris al la riĉrikolta eksperimenta kampo de Daŝi-vilaĝo en dek mil muoj. Sur la vasta unuigite ĉirkaŭlimita kamparo, plena milo da geviroj tie laboras en vicoj aŭ en grupoj. Iuj "nutras" la rizplantojn kaj aliaj "barbiras" por ili, (t. e. poststerki kaj fortranĉi la folipintojn). Iu el ili eltiris plantidon kaj ĝin montris al ni. Ĝi kreskas kun radiko longa, trunketo fortika kaj stipoj multaj. K-do Guo Tian, la partia sekretario de la vilaĝa ĉelo, informis nin, ke ĉi tiu "ĉirkaŭlimita kampo kun dek mil muoj" estas difinita por produkti 7.5 tunojn da rizgreno po muo (aŭ 1.125 tunojn po aro). Nun ili ĉiuj impetas por konkeri la nombrojn de spikoj kaj grajnoj. Kiam mi demandis, ĉu oni estas certa pri la sukceso, ĉiuj unuvoĉe respondis: "Certe." Tio estas voĉo de simplaj kamparanoj. Tio pruvas, ke scienco estas jam mastrita de ili mem.

Tuj poste, ni vizitis la eksperimentan kampon en Ĉenggiaŭ-vilaĝo de Panju-gubernio. Ĝi estas plantejo prilaborata kune de la partia sekretario de la gubernia komitato, kaj lernantoj de lokaj gimnaziaj kaj instruistaj lernejoj. Ili kreskigis 90,000 kanojn sur tero de unu mu-o per la metodo de transplantado. Nun, ĉiu kano jam pezas preskaŭ 1.5 kg., entute 135 tunojn. La kanoj kreskas altaj pli ol homo; kaj tiel dense, ke eĉ kuglo ne povas traflugi. Restas ankoraŭ pli ol

kvar monatoj ĝis la tempo por rikolto, la celo de 300 tunoj estas certe atingebla.

En la gubernio fondiĝis agrikultura universitato. Ĝi estas vere necesa por fari agronomiajn studojn kaj eksperimentojn al la gubernio, kiu havas pli ol 320,000 loĝantojn kaj 630,000 mu-ojn da agro. Kiam ni vizitis ĝin, la studentoj estis konstruantaj tri-etaĝan domon per siaj propraj manoj. La studentoj en sama tempo, kaj lernas teorion kaj kulturajn eksperimentajn kampojn. K-do Guo Hiu-min partia sekretario de la gubernia komitato diris al mi, ke oni jam decidis fondi ankaŭ industrian fakan lernejon por eduki teknikistojn por la 3,000 fabrikoj grandaj kaj malgrandaj funkciaj en la tuta gubernio. Tio estas necesa por samtempa disvolviĝo de industrio kaj agrikulturo. La gubernio jam finkonstruis grandan metanan elektrejon kaj havas siajn proprajn ŝipkonstruejon kaj fabrikon de mekanikaj terkulturiloj. Juna teknikisto Ĝu Ko, origine nur gradigito de malsupera mezlernejo, nun fariĝis specialisto dank' al praktikado en produktado. Li verkis libron pri utiligo de metano, kiu forvendiĝis je pli ol 200,000 ekzempleroj. Proksime al la metana elektrejo staras fabriko de granola ĥemisterko. Mi demandis pri la kreinto de la maŝino. "Ne estas facile ĝin diri: oni lernis iom dum vizitoj, legis iom el ĵurnaloj kaj pensis iom per si mem," estis la respondo, sed sagaca kaj prava. Ĉiu invento aŭ kreaĵo rezultas ĉe ni el kolektiva saĝo de l' popolamaso.

Ĝuste unu tagon antaŭ nia vizito al Panju-gubernio, estis proklamata la formiĝo de la tuta gubernio en unu sola popola komunumo. Pri tiu granda okazaĵo mi demandis la opinion de ĉiuj, kiujn mi renkontis, ĉu survoje, ĉu en la komuna manĝejo, ĉu en la kampoj. Inter ili estis produktbrigadaj estroj, komunumanoj kaj maljunulinoj. Ili ĉiuj ĝojplene kaj unuvoĉe ĝin laŭdis. Iuj diris: "Laŭ la nova sistemo de la popola komunumo, ĉiuj kontribuas sian laborforton, kaj por ĉiuj komunas la monujo; 'unu por ĉiuj, ĉiuj por unu'", pri nenio oni plu timos. Aliaj diris: "Manĝo senpaga, lernado senpaga, kuracado senpaga kaj ĉiu laborkapabla homo ricevas krome monatan salajron de ĉirkaŭ dek juanoj almenaŭ! Ne estas atendite, ke tiel rapide jam transiĝas paŝon post paŝo al komunismo." Al du avinoj sidantaj sur ŝtonbenko en ombro de arbo por ĝui la malvarmeton mi demandis: "Ĉu la popola komunumo estas bona?" Ili kune respondis: "Kial ne, ĉiuj povas manĝi ĝissate, vesti sin varme, kaj labori konstante. Ja bonege!"

Por sinorganizo de la tuta gubernio en unu popolan komunumon, la avantaĝaj kondiĉoj estas pretaj al Panju, kiu situas sur ebenaĵo, kaj kies kampoj ne estas disaj sed intertuŝantaj, kaj kampare koncentritaj, kaj kie la produkt- kaj viv-nivelo de la agrikulturaj kooperativoj estas ankaŭ pli malpli egalaj. Ĉijare dank' al la granda saltego en produktado, la jara sumo de industria kaj agrikultura produktvaloroj de la gubernio estos pli ol 316.000,000 juanoj laŭ takso (t. e. 976 juanoj po

loĝanto). Ĝi kreskos al 368%, kompare kun tiu de la pasinta jaro. Organizi la loĝantarojn urbajn kaj kamparajn en unu komunumon kaj praktiki la sistemon de senpaga livero de ĉefaj nutraĵoj kun salajro pagata laŭ diversaj kategorioj estas eble en tia gubernio, kia Panju, kiu estas origine kompare riĉa kaj kies antaŭen-saltego en produktado ĉijare estas tre granda.

Dum mia unu-taga vizito en Panju, mi povis rigardi nur kiel rajdanto sur trotanta ĉevalo al

**U**NU senkompare altvalora letero — dankletero de la korea popolo adresita al la ĉinaj volontuloj kaj popolo, estis transdonita de Pak Ĉung-aj, la vicestrino de la Centra Komitato de Korea Labor-partio, al Guo Mo-juo, la estro de la ĉina popola delegitaro al Koreio, kaj Generalo Jang Jong, la ĉefkomandanto de la ĉinaj volontuloj, je la 24-a de oktobro p.m. en la grandioza popola mitingo de la heroa urbo Pjungejang por adiaŭi la ĉinajn volontulojn hejmenveturontajn.

En ŝtorma aplaŭdo, tiu ĉi letero estis disfaldita sur la estrado. Ĝi estas en formo de ekrano, entute 1.2 metrojn alta kaj 2 metrojn larĝa. Sur ĝiaj ses oranĝruĝe lakitaj tabuletoj, koreaj metiartistoj delikate inkrustis la tutan tekston de la letero per purblanka perlamoto el la Orienta Maro. Sub la lumo de hidrarga lampo, ĉiu vorto brilas belege kiel perlo, kaj tiuj ĉi oraj vortoj estas himno pri la ĉina-korea amikeco plej bela en la mondo. Ĝi devenas de la sango de la popoloj ĉina kaj korea, verŝita en la komuna batalo, kaj estas korvoĉo de la korea popolo, kiu havas senkomparan amon kaj fidon al la ĉinaj popolo kaj volontuloj.

Kune kun tiu ĉi letero estis transdonitaj la 228 libroj de subskriboj de 6,847,439 koreaj popolanoj,

**Akceptu, K-do volontulo!**

*Foto: Li Hjue-zeng*



*Vang kaj Ju:*

## Grandioza himno

lukse binditaj kun kovriloj el ruĝa silkajo. Oni malfermis la unuan subskriblibron. En ĝi la unua subskribinto estas Kim Ilsung, la eminenta gvidanto de la korea popolo kaj estimata amiko de la ĉina.

Multe da kortuŝaj scenoj kaj neforgeseblaj epizodoj okazis dum kolektado de la subskriboj. Laboristoj en laborkonkursado ĝin subskribis apud maŝinoj; kamparanoj subskribis surmetinte sian blankan robon tradician, okjara infano kun ruĝa tuko ĉirkaŭ la kolo subskribis kune kun la 80-jara avo, kripla eksmilitisto kun malplena dekstra maniko subskribis per la maldekstra mano. De Pjungejang ĝis Vunsan, de Ĉangĝin-lago ĝis Samkanmonto, oni kunvenis, laŭtleĝis la leteron kaj rememoris la meritojn de la ĉinaj volontuloj; ĉu laboristoj, kamparanoj, soldatoj, studentoj aŭ komercistoj, ĉu viraj aŭ inaj, junaj aŭ maljunaj, ĉiuj subskribis la leteron kun la emocio de adiaŭanto, de kiu foriras karulo.

Unu nomo — unu himno de amikeco. Ĉoj Heun, modelo en subtenado de la fronto, 15 fojojn batalis flankon ĉe flanko kun ĉinaj volontuloj sur la fronto de Ĉangĝin-lago en neŭventego, kaj detruis 7 Usonajn tankojn, diris post subskribo: “La internaciisma solidareco de la ĉinaj popolo kaj volontuloj ĉiam nin kuraĝigas, tiel ke ni ekhavas kuraĝon kaj forton antaŭ ĉia ajn malfacilaĵo, ilin ekmemorante. Rju Maj, “Panjo de volontuloj”, kiu savis multajn vunditajn volontulojn, diris: “Ni neniam forgesos la sangon kaj ŝviton verŝitajn de la volontuloj sur nia tero. Por mi la volontuloj ne estas fremdlandanoj, sed miaj propraj gefiloj.

floroj, tamen mi ĉie rimarkis tute novan atmosferon, novan kreadon, kaj novajn atingojn.

Tra guto da akvo estas videbla la suno. La lokoj, kiujn mi vizitis en Panju-gubernio, estas ordinaraĵaj vilaĝoj, la plej malsuperaĵaj bazoj de la lando. Sed el la diversaj ŝanĝiĝoj tieaj oni povas vidi ankaŭ la mondskuantajn aferojn kiujn faras nun la 600 milionoj da ĉina popolo!

**Mallongige tradukita de Censinio**


## internaciisma

Kaj ni sentas nin tre feliĉaj havante tian fratan landon kia Ĉinio.”

Unu nomo — unu historio pri kunsorta luktado vivmorta. Ĝaŭ Gjunlong, modela laboristo de Pjujung-a Fabriko de Tekstmaŝinoj, subskribis la leteron kaj diris palpante sian brakon: “Usona aeroplano vundis mian brakon en la milito, tamen kamaradoj volontuloj min savis malgraŭ la bombardado kaj flamego, kaj min resanigis. Mi pene laboros per la mano kuracita de la volontuloj por antaŭdate plenumi la kvinjaran planon.

Unu nomo — unu ĵurpromeso. La membroj de Luo Ŝeng-giaŭ Agrikultura Kooperativo de Sakĉangni-vilaĝo, Sungĉun-gubernio, kie internaciisma heroo Luo Ŝeng-giaŭ oferis sian vivon por savi korean knabon Ĉoj Hjung, subskribis la dankleteron antaŭ la tombo de la martiro. Ĉu viraj aŭ inaj ĉu junaj aŭ maljunaj ĉiuj surmetis en la subskriba tago sian festan veston. Ĉoj Hjun, kiu estas plijuna frato de la savita korea junulo Ĉoj Hjung kaj ĉefo de Luo Ŝeng-giaŭ Junula Ŝturmbrigado, subskribinte diris: “Ni estu indaj al la nomo de frato Luo Ŝeng-giaŭ; por danki lin kaj la volontulojn, nia junula ŝturmbrigado lernu lian spiriton, konstruu ĉi tiun malriĉan montregionon en socialisman edenon, kaj penu por plifruue efektiviĝi pacan unuiĝon de nia patrolando.”

Unu nomo — unu koro. Juna virino Hong Ŝunbun, kiu protektis du volontulojn en kriza situacio dum la milittempo, diris: “Mi skribas mian nomon sur la leteron, por ke ĝi estu portita al Ĉinio de la volontuloj kaj restu kun la ĉina popolo, ke neniam disiĝu niaj koroj.”



**Antaŭ sia hejme-reiro ĉinaj volontuloj klopodas finkonstrui grandan akvokonservejon kun kapacito de 1.191.900 kubmetroj por la koreaj gefratoj de koksano.**  
*Foto: Ju Ĉeng-gian*

Ho! la 6,847,439 nomoj reprezentas la korojn de la tuta korea popolo. Tio estas alta honoro donita de la korea popolo al la ĉina kaj ĉinaj volontuloj, tio estas himno de proletara internaciismo, manifestiĝo de la volo de la korea popolo eterne amikiĝi kun la ĉina kaj tio estas ankaŭ epopeo pri la plia firmiĝo de disvolviĝo de la amikeco inter Ĉinio kaj Koreio.

**Ankaŭ 76-jara avo venas adiaŭi la ĉinajn volontulojn.**  
*Foto: Lju Hoŭ-min*



# La Popola Komunumo de Hjuŝuj

**E**NIRANTE en la limon de Hjuŝuj-gubernio la aŭtomobilo ŝajne kuris eksterordinare rapide, kvankam efektive ĝi estis iranta malrapide. Ĉar tie la vidajoj estis tiel riĉaj kaj diversaj ke preskaŭ ĉiu loko tiris al ni la okulojn. Oni avide rigardis eksteren tra la fenestroj, por kapti ĉiujn novaĵojn. Sed vi apenaŭ vidis ion pli malpli konture, tuj alia novaĵo sin prezentis.

La vetero de la frua aŭtuno estis freŝa kaj serena, sen vento kaj sen polvo, tiel ke la ĉielo montris sin eksterordinare alta, kaj blua kiel maro, krom kelkaj blankaj nuboj. Kun tia pura kaj bela fono brilas al la okuloj tiel agrable la surtera spektaklo kvazaŭ ĵus pentrita akvarelo. Ĉirkaŭe estis senfina kamparo de diversaj plantoj, de malproksime ĝi aspektas kvazaŭ maro, sed multe pli riĉa je koloroj: la malhelbluaj kotonplantoj, la verdaj batataj rampaĵoj, la freŝe plantitaj helflavaj brasikoj, la bruna duonmatura maizo. . . Ĉar ili ĉiuj vivplene kreskis, el la koloroj kvazaŭ sekreciigas tavolo da pura oleo, ke la kreskaĵoj aspektas des pli belaj en la sunbrilo.

La aŭto ekhaltis apud kotonkampoj. Elveturiliginte mi ekstaris apud kotonplantoj, kaj vidis ke ili estas pli altaj ol mi je unu kapo. Mi memoras,

## Aliĝu kaj kunlaboru!

**TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO (TEĴA)** fondiĝis. Ĉiuj esperantistoj-jurnalisto, redaktoroj en eldonejoj, korespondantoj, publicistoj estas petataj tuj membriĝi al ĝi. Ĝia organo "Internacia Ĵurnalisto" jam aperas en Bulgario. Detalojn petu ĉe **IVAN KEREMIDĈIEVESPEROV**, bul. "Hr. Botev" 96, Sofio 2. Bulgario.

**KUNLABORU EN IPTS** (Internacia Progresema Traduk-Servo) Via tasko estas traduki laŭplaĉe kelkajn aŭ ĉiujn al vi sendotajn rakontojn kaj proponi ilin por publikigo al diversaj vialokaj gazetoj kaj journaloj. Turnu vin al **A. V. Zednik**, Modřany 1482, PRAHA, ĈSR, kiu post via konsento sendos al vi komence naŭ beletrajn rakontojn.

ke en la junaĝo desirante kotonon en la hejmvilaĝo, mi devis kliniĝi super ĝin. Nun mi estas multe pli alta ol tiam, sed ĉi tie mi devas levi mian kapon kaj etendi mian brakon por atingi la suprajn kotonfruktojn. Ne, mi ne povis eĉ ĝin atingi! La kotonplantoj estis tiel dense plantitaj ke oni ne povis eniri libere inter ilin. Super la kotonplantoj estis etenditaj multaj elektraj fadenoj kaj en distanco de po du-tri futoj estis unu elektra lampo. Nokte ekbrilegis tiuj elektraj lampoj super la densa kotonplantaro. Tio estas artefarita sunbrilo, kiu fotosintezas reakcias kun la folio de la kotonplanto kaj akcelas la kreskadon de la kotonplantoj. Sekve ili same kiel nia popolo tra la tuta lando klopodas per sia plej granda peno sin puŝante kiel eble plej antaŭen por tagnokte fabriki kotonon por ni. Sur iu kotonplanto troviĝis 124 kotonfruktoj. Oni atendis ke produktiĝos 500 kg. da desemigita koton po muo aŭ 75 kg. po aro kaj rompiĝos la rekordo de abunda produkto de koton!

La koton en Hjuŝuj-gubernio estas nur unu el la multaj ekzemploj, kaj tute ne elstaras sola. La aliaj agrikulturaj plantoj kreskas ankaŭ en la sama rapideco. En unu eksperimenta kampo estis dense plantitaj pli ol 170,000 someraj miliplantoj po muo, kaj produktos 5,312.5 kg. da milio, pli ol 30-oble kompare al la ordinara produktkvanto de 150 ĝis 250 kg. po muo. Sur alia kampo de legomo oni trovis ion similan al piramido. Brasikoj estis plantitaj ringe sur ĝi de la bazo ĝis la pinto kvazaŭ sur spirala ŝtuparo. Tio estas, la brasikoj kreskas de la tero en la aeron. La piramido okupis teron nur de 3 dekonoj de muo, sed ĉar ĝi okupis la aeron spacon super la tero, ĝia efektiva utiligebla surfaco duobliĝis. Sur tiu ĉi surfaco, estis plantitaj 100 brasikoj, ĉiu el kiuj, oni taksis, kreskos ĝis la pezo de 50 kg.

Kiel povos tiuj brasikoj kreski tiel grandaj? Ĉar ili estas kulturataj per metano, kaj la kampo estas nomata metana legomkampoj en la formo de "Ĉiela Altaro". Tio estas invento de membroj de la loka komunumo. Ne nur la spaco supre sed ankaŭ la spaco sub la tero estas utiligata. La interno de la piramido estas kelo plenigita per 60 tunoj da ĉevala fekaĵo, kiu post fermentado fariĝos tre bona sterko utiligebla por alia celo. Dume la metano produktata ĉe la fermentado fariĝas nutraĵo por la brasikoj.

Mi vidis ankaŭ porkbredejon kiu celis bredi porkojn po 500 kg. Ĝi estis pure balaita, kaj en ĝi estis arboj kaj floroj kvazaŭ en ĝardeno. La bredisto portis blankan superveston kiel kuracisto. Vizitantoj devis purigi siajn ŝuojn antaŭ la eniro, por ke malpuraĵoj ne estu enportataj en la bredejon. Fine mi trovis ke ĉiuj porkoj estas etuloj ĉirkaŭ 2 futojn longaj. Ili estis irantaj tra pordeto al la najbara "ludĉambro" por sin amuzi. Mi miris iomete: Kiam tiuj etuloj povos kreski ĝis 500 kg.? La bredisto en blanka supervesto tion legis el mia mieno kaj kondukis min silente al porka enfermejo. "Rigardu!" li diris, montrante internen. Ho, tie kuŝis granda blanka grasa porko, kiu pezas almenaŭ 250, se ne 500 kg. La bredisto ridante diris: "Ĉio dependas de la homa faro! Post kelka tempo venu rigardi denove!"

La membroj de la komunumo en Hjuŝuj ne nur povos kreskigi brasikojn de 50 kg. kaj elbredi porkojn de 500 kg., sed ankaŭ entreprenas modernajn industriojn. Kelkaj grandaj kamentuboj elstariĝis alte sur la tero apud la fervojo. Ili estas nove konstruitaj alt-fornejoj. Unu el ili estis ĝuste vomanta elfanditan feron. Likva fero ŝprucis el la truo de la fornego kvazaŭ ruĝa fontano, kaj fluis obee en profundajn kavojn, kiujn la fandistoj faris en la tero, kaj solidiĝis en feraj blokoj. Moderna procedo estas uzata en la manipulado de la altfornejoj, sed en la ellasado de fandita ferprodukto estas aplikata malnova metodo. Niaj gisistoj tiel lerte uzis ambaŭ metodojn kiel artistoj, sed ĝis la tempo de la konstruado de altfornejoj ili estis nur ordinaraĵoj terkulturistoj.

Ne malproksime de la loko estas nove establita tapiŝa fabrikejo. Oni diris ke la komunumanoj tie laborantaj ellernis la teknikon de tapiŝa fabrikejo en malpli ol unu semajno, kaj ilia produktajo jam povas esti eksportataj kaj konkursi en la internacia merkato. La tapiŝoj estas tiel freŝaj en koloroj kaj belaj en desegnaĵoj, kiajn povas fari nur homoj plenaj de fantazio kaj poezia sento. Krome, ili ankaŭ teksas belajn litkovrilojn kaj kolordesegnitajn ŝtofon el diversaj fibroj, kiujn ili faris el la loko produktataj diversaj herbajoj kaj sovaĝaj plantoj, kaj ĉio atestas ke la membroj de la komunumo estas efektive revemaj inventistoj kaj samtempe artistoj.


Tio estas plie evidente rimarkebla kiam vi eniras ilian vilaĝon. Ilia slogano estas verdigo kaj aromigo de la komunumo. Efektive ilia vilaĝo estas jam tre "verda" kaj "aroma", kaj plie "kolora". La verdaj arboj, diverskoloraj floroj, ruĝa ĉefvojo, helflava placo, blankaj muroj multekoloraj murpentraĵoj kaj poemoj inter murpentraĵoj, ĉio estas vere ege bela kaj riĉa por la okuloj.

Ĝuste en tia medio plena de poezio kaj pentraĵoj, la komunumo establis siajn infanĝardenojn, maljunulajn hejmojn, elementajn lernejojn, mezlernejojn, universitatojn de ruĝuloj kaj specialistoj, vestfabrikejojn, kudrejojn, malsanulejojn, teatrojn kaj eldonejojn. Ili klopodas ne nur en produktado, sed ankaŭ en kreado de riĉa kultura vivo.

Tio estas utopio kiun niaj prapatroj sopiris kaj ne povis efektivigi de jarmiloj. Nun ĝi konturigas antaŭ ni, palpebla kaj videbla, ĝi estas ĝuste en sed ne ekster nia mondo, kiel la antikvuloj imagis al si. Kaj cetere ĝi konstante antaŭeniras eĉ al io pli bela ol la utopio imagita.

## Rekordaj rikoltaĵoj por donaci al la partio

(Murpentraĵo)



**S**UJ instruituloj asertis, ke estas neeble altigi la sciencan kaj teknikan nivelon en Ĉinio, kie la industrio restas ne disvolvita. Sed, pasis nur kelkaj jaroj tiu ĉi aserto jam plene bankrotis. La fakto estas, ke kompleta industria sistemo jam formiĝis sur la vasta tero de Ĉinio.


La t. n. internacia nivelo ja ne estas ia neatingeblaĵo por ĉinoj. Multajn pruvojn ni povas trovi en la Ekspozicio de Tutlandaj Industrio kaj Komunikado. Ekzemple en studo pri atomenergio, Ĉinio jam havas sian unuan atoman reakciilon kaj la unuan ciklotronon. Estas ne necese multon diri pri la aliaj industriaj faktoj. Ni jam komencis fabriki kion fabrikas aliaj landoj kaj pli multe en specoj tagon post tago. Kaj ni jam havas kelkajn produktaĵojn, kiujn ankoraŭ ne produktas aliaj landoj.

## Tekniko eminenta, produktaĵoj unuaklasaj

En produktado de ŝtalo — la ĉefgeneralato de nia industrio — la metalurgia tekniko jam superis tiun de kapitalistaj landoj. La fame konata

### Elverŝi ŝtalon per tri defluiloj

*Lignogravuraĵo de Jue Heng*



## Je Gang:

# AL LA PINTO

## — Notoj pri la Ekspozicio de

metodo elverŝi fluidan ŝtalon per tri defluiloj kreita de Ĉinio estas novaĵo de ŝtal-produkto per Martin-forno en la mondo. Tiu metodo pliigas la produktivon de Martin-forno je 1.6 obloj ol la malnova metodo per unu defluilo, kaj je 40% ol per du defluiloj. Ni starigis novajn rekordojn ankaŭ en koeficiento de utiligo de la altforno kaj Martin-forno. En junio, 1958, la meznombra volumenuutiliga koeficiento de altfornoj jam reduktiĝis ĝis 0.626 kaj tiu de ĉirkaŭ duono de la altfornoj jam reduktiĝis ĝis malpli ol 0.6. Dume tiu de Usono en 1957 estis 1, t. e. per sama volumeno ĉina altforno povas produkti pli multe ol la Usona en sama tempdaŭro je pli ol 60% da gisfero. Kaj la taga produktivo po kvadrata metro de la surfaco de niaj Martin-fornoj en 1957 estis 7.21 tunoj kaj superis tiun de la Usonaj (5.6 tunoj) je 1.61 tunoj. Kaj en la unua duonjaro de 1958, nia produktivo ankoraŭ plialtiĝis al 7.7 tunoj po kvadrata metro.

Multvariaj estas ankaŭ la specoj de niaj ŝtalproduktaĵoj. Sur la stando de ŝtaloj estas ekspozitaj: 120-milimetra ŝtalplato, 550-milimetra H-forma ŝtalo, 80-kilogramo relo por argano, 0.025 milimetra ŝtalbendo ktp., kiujn povas produkti nur moderna ŝtalindustrio. En produktado de aloj-ŝtaloj, la nove provfabrikita altfortikeca malaltaĵa ŝtalo n-ro 80 jam superis en kvalito la samspecan produktaĵon de Usono. Rilate al la fajrrezistantaj materialoj, la alumini-magneziajn kaj alt-aluminiajn brikojn el magnezito kaj alumina minajo ankaŭ fabrikas kaj uzas unue en Ĉinio, dume restas ankoraŭ fremdaj por Britio kaj Usono.

La grandioza ekspozicia fako de maŝin-industrio kiu ampleksas la centran halon kaj la apudajn kortojn, pleniĝas de ĉiuspecaj produktaĵoj, de la plej kolosaj minejaj maŝinegoj, ĝis al plej malgrandaj globlagroj, de ĉielskrapa bormaŝino por oleputo ĝis precizaj instrumentoj. Interalie, grandegaj torniloj, dekmil-tonela ŝipo, precizaj aparatoj, grandaj kaj malgrandaj elektrometroj kaj maŝinoj por malpezaj industrioj — miloj kaj miloj da novaj produktaĵoj jam egalas aŭ superas la samspecajn produktaĵojn de Britio kaj Usono en kvalito.

## Novaj kreaĵoj

La brilaj valvoj de duonkondukanto, la giganta 2500-tuna hidraŭlika premaŝino, la delikataj

# DE TEKNIKO

## Tutlandaj Industrio kaj Komunikado—

precizaj dentradofariloj, la elektra kopia frezmaŝino, unu el la plej bonaj aŭtomobiloj de la mondo "Ruĝa Flago", la giganta elektra ŝovelilo, la bel-aspektaj kuracaj instrumentoj kaj aparatoj kaj la ŝtalmuldita altprema ujo por fabriko de nitrogena sterko, ĉio ĉi tio en la fako montras, ke ne necesas longa tempo por Ĉinio por kuratingi kaj superi Brition en ĉiuj fakoj de maŝinfabrika industrio. Sur la placo oni povas vidi la funkciantan akvopumpilon movatan per interna brulado, kiun alilandoj ankoraŭ ne fabrikas. Tiu ĉi kreaĵo estas fiero de nia maŝinfabrika industrio kaj plifortigas nian memfidon.

La ekspoziciaĵoj pri ekspluatado de karbomino per hidraŭlika metodo en la fako bone montras la nivelon, kiun nia karbo-industrio jam atingis. En la ekspozicia salono de elektro-industrio troviĝas modelo de la elektrotranssenda konstruaĵo de 220 000-volta kurento interliganta la urbotrion de Vuhan. Kies kabloj transpasas la 1718 metrojn larĝan Jangzi-riveron subtenataj de altgaj ferbetonaj subteniloj, kiuj estas unuafoje aplikitaj en la mondo. En la ekspozicia salono de fervojo, la modeloj de fama Jangzi-rivera Pontego kaj la ĵus inventita nova aranĝo de frogo\*, kiu ebligas la pasadon de trajno sen rapidlimigo montras, ke la cirkulado de ĉinaj vagonaroj pli rapidiĝos. En la fako de kemia industrio oni vidas la pli ol 40 specoj de aktivradikaj tinkturiloj kiuj jam superis la britajn produktaĵojn en nombro de specoj. La senfadena kaŭĉuka radringo de aŭtoj okupas novan paĝon en la monda historio de kaŭĉuka radringo.

Neelkalkuleblaj estas la novaj produktaĵoj por la ĉiutaga vivo. Promenante en la supera etaĝo de la centra halo oni sentas sin kvazaŭ en pompe floranta ĝardeno. La bonodorantaj katunoj, unuaklasaj porindustriaj paperoj, elegantaj kaj bonkvalitaj fontoplumoj kaj diversspecaj lanteksajoj kaj ledajoj estas ĉiuj unuaklasaj en kvalito kaj bonvenigataj en la internacia merkato.

### Granda rapideco, nova stilo

Plejparto de la novaj produktaĵoj estas rezulto de la granda impetado de socialisma konstruado en 1958.

Sur la ekspozicia placo de traktoroj, troviĝas unu apud la alia du klarigtabuloj: la unua anoncas,

ke kvar specoj de internebrulaj maŝinoj mondnivelaj produktiĝos en la periodo de la dua kvinjar-plano, inter kiuj estos liber-piŝtona gasturbino; kaj la alia korektas, ke la liber-piŝtona gasturbino estas jam ĉe la antaŭnokto de sia naskiĝo. La korekto necesiĝis ne pro malatento de la ekspoziciaj laborantoj, sed pro tio ke maŝinfabrikaj laboristoj plifruigis la plenuman daton je kelkaj jaroj.

Antaŭ la rapidaj kuras ankoraŭ pli rapidaj—per tia rapideco impetadas nia industrio.

Ekzemple, en ŝipkonstrua industrio 5000-tonela ŝipo ĵus surakviĝis, 10000-tonela oceana ŝipo jam estas en konstruado; en aŭtofabrika industrio, ni povis produkti nur unu specon de ŝarĝaŭto en 1957, sed en 1958 jam produktiĝis pli ol 100 specoj de aŭtomobiloj kaj ŝarĝaŭtoj; en 1957 ankoraŭ neniu traktoro fabrikiĝis, sed 278 specoj de traktoroj fabrikiĝis en tre mallonga periodo de 1958; en radio-industrio, la utiligo de duonkondukanto estis nur temo priparolata en 1957, sed nun jam eliris la unuaj kristalo-valvoj; en metalurgio, baldaŭ jam venos la tempo kiam Ĉinio havos ĉiujn metalurgiajn fakojn de produktado de koloraj metaloj kaj starigos metalurgian sistemon en fabrikado de altkvalitaj aloj-ŝtaloj. Ĉio decidiĝis en nur kelkaj monatoj de lasta jaro.


### Triumfa kanto plej brava

Sed kiel oni konkeris la teknikajn malfacilaĵojn por fabriki tiujn produktaĵojn unuaklasajn en la mondo? Je la miro de multaj, ili ja ne estas kreitaj per la manoj de specialistoj kaj instruituloj, sed ĝuste per la laboro de ordinaraj laboruloj. La kreinto de aktivradikaj tinkturiloj estas ordinara teknika laboranto; la inventinto de la nova frogo estas ordinara fervojisto; la trovintoj de plej bonkvalita fajrezista materialo kaj fabrikintoj de pli ol du mil specoj de novaj fajrezistaj produktaĵoj en la daŭro de tri jaroj estas dudek kelkaj eksarminoj, kiuj ne antaŭhavis teknikon. Koncerne la ekipajn kondiĉojn oni trovas, ke la koncernaj fabrikoj estas plejparte nmodernaj. Ĉangŝing-fabriko de Fajro-rezistaj Materialoj, kies produktaĵoj superis tiujn de kapitalismaj landoj en kvalito, estas en komenco nur malgranda fabriko fondita en kaduka templo kun nur unu indiĝena forno; la Alojfabriko de Benhi, kies altvaloraj produktaĵoj nombriĝas je pli ol 270 kaj bone vendiĝas en fremdaj landoj, havis antaŭ kelkaj jaroj nur unu kaldronon kaj du kuleregojn.

Ĉio ĉi tio estas la plej bela poemo kaj la plej brave triumfa kanto verkita de la ĉina popolo en la industria fronto.

\* frogo—instalaĵo por kunigo de trakoj.

# Hua Ding: Nova ferstala bazo en Vuhan



**T**UJ kiam la vagonaro forlasis la stacidomon de Vuĉang, la ĉefurbo de Hubej-provinco, kaj venis al la antaŭurbo, la torenta Jangzi-rivero, verdaj kampoj, gigantaj fer-turoj kaj laktoblankaj kamentuboj sin ekprezentis antaŭ la okuloj. Oni facile imagas, ke li jam venas en la tute novan kaj grandegan industrian kvartalon.

Momenton poste aperis sur la vasta kamparo serioj da ruĝaj konstruaĵoj, kiuj sin sternis laŭlonge 5 kilometrojn. Antaŭ la liberiĝo tie estis ja dezerta loko, sed ĝi jam fariĝis tute nova multloĝata kvartalo, kies loĝantaro kreskis de 10,000 en 1955 ĝis la nuna 150,000.

Ekster tiu ĉi nova kvartalo estas areo de grandegaj fabrikaj konstruaĵoj. Sur iu monteto mi venis antaŭ la panoramo: Gigantaj fabrikaj domaroj staras sur la fono de blua ĉielo, senfinas vicoj de ŝtalaj framoj por novaj konstruaĵoj, kaj alte sin levas grandegaj arganoj inter la konstruaĵoj konkure kun la ses fumtuboj altaj je 100 metroj. Tie kaj ĉi tie super la ruĝaj tegmentoj eliras vaporoj. La kolosa altfornego n-ro 1 kaj ĝiaj varmoblovaj fornoj nubskrapante staras en la centro de la konstruaĵoj. Jen estas la Fer-ŝtala Uzino de Vuhan, nova ferŝtala bazo de Ĉinio.

Fronte de tiu ĉi areo estas Jangzi-rivero, malantaŭe, la Vuĉang-Daje-fervojo; maldekstre

kuŝas la urbo Vuĉang kaj dekstre najbaras la ferriĉa regiono de Daje. Kun oportunoj en transportado kaj najbareco al riĉa minejo, ĝi estas vere ideala loko por ferŝtala bazo. Por ĝin trovi oni ja multe klopodis. Ekde marto de 1952 la uzino sendis du ekspediciojn por trovi taŭgan lokon por sin instali. Ili travojaĝis en tiu regiono pli ol 360,000 kilometrojn kaj faris gigantajn studajn laborojn. 32 eventualajn lokojn ili rekomendis, el kiuj specialistoj ĉinaj kaj Sovetiaj elektis post longa studo kaj komparado, la nunan, pro ĝia proksimeco al minejo, urbo kaj Jangzi-rivero. Junaj minesploristoj trovis dum traesploro en la regiono de Daje ĝis Eĉeng novan riĉan ferminon, kies entenajo sufiĉas por provizi la uzinon en 20 jaroj. Inter la okcidenta kaj orienta minkorpoj de la Fermonto oni trovis ankaŭ la falrompitan parton "netroveblan" laŭ la aserto de britaj, Usonaj kaj japanaj specialistoj. Fine en jarfino de 1955 la konstruado de la uzino estis komencita.

La Fer-ŝtala Uzino de Vuhan estas granda aŭtomatizita kombinita entrepreno, kiu konsistas el minekspluatado, selektado de minajoj, brul-kunigado, fergisado, ŝtalproduktado, laminatado kaj produktado de koakso, kemiaĵoj kaj fajrorezistaj materialoj. La mekanikizeco de la uzino atingos plej altan gradon. Post la finkons-



truiĝo ĝia ŝtala produkto egalos trionon de nia tutlanda produkto de la jaro 1958.

La projektado kaj konstruado de la uzino profitas ĉiujn progresajn teknikojn de la mondo dank' al helpo de Sovetio. Pli ol 600 fabrikoj en Sovetio partoprenis la produktadon de la ĉefaj ekipaĵoj. Ekde 1950 pli ol 80 eminentaj Sovetiaj inĝenieroj estas senditaj al Ĉinio por helpi la konstruadon.

Kiam mi vizitis la uzinon, ĝia konstruado atingis ĝuste la kulminon. Entute 135 konstruaĵoj de 23 diversaj branĉoj estis samtempe en konstruado. "Duonigu la konstrutempon kaj investon kaj duobligu la produktopovon" jen estis la heroa devizo de la 50,000 konstruantoj. Kelkaj el la okcidentaj landoj dubis la eblon de rapida konstruado de la uzino. Iu ĵurnalo en Londono metis en 1957 grandan demandsignon post la raporto, ke anstataŭ en la fino de printempo en 1959, la altforno n-ro 1 de la uzino ekproduktos feron en la fino de 1958. Sed poste montriĝis ke anstataŭ en la fino de 1958, ĝi ekproduktis feron fakte je la 3-a de septembro en 1958 dank' al la klopodado de heroaj kaj persistaj ĉinaj laboristoj, t. e. 108 tagojn ankoraŭ pli frue ol je la dato dubita de la Londona ĵurnalo.

Dank' al la plej progresaj teknikoj aplikitaj, tiu altforno konsumas kompare pli malmulte da koakso, sed plimulte da gisfero el ĝi elfluas. Nun ĝia taga produktokvanto jam superas 2,000 tunojn kaj bonkvalita estas la produktajo.

Malantaŭ la altforno n-ro 1 troviĝas koaksoforno, plej granda en sia speco en Ĉinio krom en Nordoriento. Ĝi jam komencis la produktadon. Se ĝi ne estas tiel impone alta kiel la alta forno, tamen ĝi estas pli grandioze vasta ol la lasta. La orienta kaj okcidenta turoj por liverado kaj konservo de karbo respektive estas ligitaj per oblikva ponto kaj enaera koridoro, formante gigantan reton de karbotransportado. Kvar nubskrapantaj fumtuboj gardstaras en vico la terenon de la koaksofornoj. El la unua fumtubo jam elŝvebas fumstrioj, kaj la ceteraj koaksofornoj estas ankoraŭ konstruataj. Tiun koaksan fabrikon de la Ferŝtala Uzino de Vuhan la laboristoj nomas "jaŭkianŝu\*", ĉar krom koakso kaj karbogaso ĝi produktas ankaŭ dek-kelkajn altvalorajn kemiaĵojn.

Sur la vasta ebena tereno antaŭ la koaksofabriko, traktoroj zumadas trenante ŝoveltransportan maŝinon levante la teron de mil-mil jaroj tie kuŝantan. La laboristoj jam komencas grandskalan betonadon de la fundamentoj. Ĝi estas la tereno por unu el la plej grandaj ŝtalfabrikoj en


\* Arbo, de kiu falas moneroj ĉe ekskuo laŭ ĉina mitologio.

Ĉinio. Krom unu kun kapacito de 250 tunoj, la aliaj martin-fornoj en ĝi estas ĉiuj de 500 tunoj. La ĉefa konstruaĵo de la fabriko longas je 750 metroj. La fervojoj en la fabriko formas densan aranean reton. La betonado de la uzino ampleksas 150,000 kubmetrojn. La plej granda ŝraŭbo uzita pezas je 1.7 tunoj. Laŭplane la martin-forno n-ro 1 komencos produkti ŝtalon ekde 1960. Sed nun, post diskuto de la konstruantoj, estas decidite, ke ĝi funkciu pli frue je duonjaro aŭ eĉ iom pli, ol la plano fiksas.

Krom la supre menciitaj konstruaĵoj en la tereno ampleksanta ĉirkaŭ 30 kilometrojn cirkonferente troviĝas konstruaĵoj densdense vicigitaj. Unu termika elektrejo antaŭ la altforno jam komencis liveri potencon elektron al ĉiuj anguloj de la urbotrio Vuhan. Tuj apud ĝi estas alia amaso da ruĝaj konstruaĵoj de fabrikoj, deponejoj, kontoraj domoj . . . entute pli ol 40 unuoj, kiuj formas sektion de maŝinriparado, en kiu jam plene funkcias ok riparejoj. Por plene utiligi la ekipaĵojn la laboristoj en la uzino decidis plue ĝin disvolvi en maŝinfabrikejo, por ke ĝi fariĝu unu el la produktaj centroj de metalurgiaj ekipaĵoj kaj kontentigi la bezonojn de la uzino mem dum la konstruado.

#### La koaksoforno N-ro 2 ekproduktis en okt. 1958.

Foto: de Liu Hin-ning



# La brila ĉina medicino

## kaj farmacio


*Okazis lastatempe en Pekino tutlanda kunveno kaj ekspozicio por interŝanĝo de spertoj en la teknika revolucio de medicino kaj higieno. La kunvenon partoprenis proksimume mil laborantoj en tiuj terenoj, kiuj ion kreis aŭ inventis en sia fako. La materialoj prezentataj en la ekspozicio nombris pli ol 4,500. Ambaŭ la kunveno kaj la ekspozicio montris ke grandajn kontribuojn la ĉina medicino faris al tiu de la mondo, kaj pruvis, ke la principo de "samtempa utiligo de la hejmlandaj kaj eksterlandaj atingajoj" aplikata en la medicinaj laboroj bone akcelis ties teknikan revolucion, tiel ke saviĝis la vivo de multaj personoj kiuj estis konsiderataj antaŭe ne kuraceblaj. La sekvanta artikolo informos la legantojn iom pri la ĝenerala stato de la disvolviĝo de la ĉina medicino.*

— La Red.

### De la oriento al la okcidento

En la tutlanda ekspozicio pri la teknika revolucio de medicino kaj higieno troviĝas monda mapo, kiu montras, ke ĝis nun el 32 landoj venis amikoj al Ĉinio por ricevi kaj al du frataj landoj niaj doktoroj iris por fari kuracadon laŭ ĉina medicino, kaj krome kvar landoj sendis personojn al nia lando por lerni la ĉinan medicinon kaj farmacion. Sur tiu mapo oni povas rimarki, ke trans la landlimojn kaj trans altajn montojn kaj vastajn marojn, de Pacifiko ĝis Atlantiko kaj de la oriento ĝis la okcidento, nia medicino kaj farmacio jam fariĝas riĉaĵo de la tuta mondo kaj bela floro en la ĝardeno de la homa medicino.

**D-ro Liu Da-fu (meze) pririgardas ostiĝintan salikbranĉon el hunda korpo.** Foto: Jang Li-men



### Savon al la "nesaveblaj"

La salikbranĉoj balanciĝas en milda vento. Neniu ŝajne ankoraŭ ilin rilatigus kun la penso liberigi la dumvivan suferon de foramputo de homa membro, krom en Ĉinio, kie la "kunkreskigo de rompita osto per salikbranĉo" estis aplikita jam antaŭ multaj jaroj. Lasttempe doktoro Liu Da-fu de la Hospitalo de Ĉina Medicino en Vuhan reel-fosis tiun ĉi longe perditan heredaĵon de nia tradicia medicino. Li faris naŭ eksperimentojn sur bestoj kaj bone sukcesis. Estas vere mirinda afero, ke la freŝa salikbranĉo kuniĝis kun la osto kaj fariĝis en la animala korpo vivanta parto de ĝi. Antaŭ ne longe, oni sendis al la supre menciita hospitalo tinkturiston, nomatan Liu Li-hiu, el Davu-gubernio, Hubej-provinco, kies maldekstra kruro estis rompita de muelŝtono kiu pezis 300 kg. Doktoro Liu Da-fu alfiksis en lian vunditan kruron freŝan branĉon de saliko. Oni povas vidi en unu el la bildoj ekspoziciataj ke la vundita osto de la paciento estas kreskanta. Tio konservis lian maldekstran kruron kaj savis lin de kripleco.

La surdomuteco kaŭzas al multaj homoj amaran vivon. Sed centoj kaj miloj da surdomutuloj en Ĉinio jam akiris aŭd- kaj parol-


kapablojn. La 11-a Dependa Hospitalo de la Ŝanhaja Instituto de Ĉina Medicino, kuracis per akupunkturo kaj kaŭterizo 182 pacientojn el kiuj 79% resaniĝis. La ekspozicio montras plurajn ekzemplojn el tiuj kazoj per fotoj kaj magnetofono.

La apopleksio estas rekonata ĝis nun internacie kiel malsano nekuracebla. Tamen la ekspozicio konigas, ke Vang Ĝi-ĝen, doktoro de la Unua Popola Hospitalo en Ĉengdu, savis la vivon de 10 pacientoj de apopleksio per akupunkturo kaj kaŭterizo uzante samtempe ĉinajn medikamentojn.

La Hospitalo de Ĉina Medicino en Hinhua, Hunan-provinco, resanigis 10 suferantojn de pulmosilikozo, malsano kontraŭ kiu oni ankoraŭ ne trovis efikan kuracrimedon ĝis nun en la mondo. En la ekspozicio estas foto kiu montras ke unu resaniĝinto de la pulmosilikozo prezentas honorigan standardon al la Hospitalo por esprimi siajn dankojn. La ĉina medicino ankaŭ havas kuracrimedon kontraŭ la infana paralizo, daltonismo kaj aliaj malfacilaj malsanoj. Oni sukcesis rehavigi al blindiĝinto la vidkapablon per hista sekrecio de falka okulo.

La ĉina medikamento *Rawwolfia Verticillata* havas pli grandan efikon kontraŭ la alta sangopremo ol "*Serpinae*", kiu estas rigardata ĝis nun kiel la plej efika kuracilo por tiu malsano. En Ŝanhajo, Pekino kaj multaj aliaj lokoj oni venkis la altan sangopremon ankaŭ per aliaj rimedoj. En Ŝanhajo, ekzemple, oni sukcesis trovi efikan medikamenton kontraŭ la alta sangopremo de virinoj. El 366 paĉientinoj kuracitaj oni notis malaltiĝon de sanga premo ĉe 74.6%, inter kiuj 28.7% tute resaniĝis.

En Siĉuan-provinco kreskas herbo nomata *ginkiancaŭ* (*lysimachia christinae*), kiu sennecesigas la helpon de ĥirurgo por paciento de galŝtono, kia



**D-ro Liu Da-fu (la sidanta) konservis al Liu Li-hiu la maldekstran kruron per sia mirinda kuracarto.**

Foto: Jang Li-men

ofte ree estiĝas eĉ post elpreno per operacio. Per prenado de *ginkiancaŭ*, la ŝtono solviĝas kaj malaperas por ĉiam sen operacio.

Kontraŭ la obstina nevenkebla malamiko de homaro—kancero, niaj atingoj montritaj en la ekspozicio anoncas jam la unuan venkon. En la Dua Hospitalo de Ljuda, speciala studgrupo de kancero jam resanigis du suferantojn de tiu malsano per la farmaciaĵo *ŝennongvan*. Kaj ĉe 118 pacientoj sammaniere kuracataj dum unu monato estis notitaj malapero de la simptomoj aŭ evidenta pliboniĝo de la stato. Kaj doktoro Jang Long-king, en Jiĉuan-gubernio, Henan-provinco, kuracis 64 malsanulojn de ezofagkancero, el kiuj pli ol 80% reakiris la sanon.

Riĉaj estas la heredajoj de la ĉina medicino. La materialoj prezentataj en la ekspozicio montras nur la parton reelfositan kaj disvolvitan en la lastaj jaroj. Tamen tio jam plenigas nin je fido ke la ĉina medicino kaj farmacio kontribuos ankoraŭ pli multe al la monda kulturo kaj medicino.

# Tipa Ekzemplo

Ilustris A Lau

Ekde la lasta jaro, bolis entuziasmo en la kooperativoj de nia *hiang*\*. Kvankam ĝi situas en montregiono, la finkalkulo post la aŭtuna rikolto montris, ke ĉiu persono kun plena laborpovo enspezis en la jaro pli ol 500 juanojn! Mi, kvankam neinstruitulo, tuj rimarkis el tiu entuziasmo, ke nepre okazos grandskala transformiĝo en la kamparo. Efektive la Popola Tagjurnalo aperigis la 29-an de novembro paroladon de Vicprezidanto Ĝu

\* *hiang*: administra subdivido de gubernio.

De, kiu interalie asertis: “La ekspluatado de la naturaj riĉaĵoj kaj konstruado en la montregionoj estas la tasko de 1’ tuta popolo kaj de 1’ tuta partio. Por ke la laboroj estu bone plenumitaj, devas mobiliziĝi la tuta partio, ke ekagu ĉiuj kune. . . .” Leginte la paroladon, mi eksaltegis pro ĝojo kaj diris ripete: “Prave! Ni, montanoj, ankaŭ iel nin elmontros.” Tiuvespere, mi kunvokis kunvenon de partianoj-kadroj de 1’ tuta *hiang*. Mi alvokis ĉiujn ĉeestantojn bone studi la paroladon de la vicprezidanto kaj konsideri, kiamaniere oni povas eks-

**A**NTAŬ nelonge, en klasĉambro de la Agronomia Kolegio de Ŝanhi, aperis maljunulo en simplaj vestoj kaj kun montanaj ŝuoj sur la piedoj. Li rakontis pri sia sperto en 40-jara ŝafbredado kaj pri gravedigo al ŝafino por dunaskitoj. Lia parolado surprizis la profesorojn kaj studentojn de la kolegio. La maljunulo jam fariĝis profesoro de la Fakultato de Dombesta Bredado de la nomita kolegio. Ankaŭ la profesoroj lernas de li.



La maljunulo estas ŝafisto de la Agrikultura Kooperativo de Vajaŭ en Lingĉuan-gubernio, Ŝanhi-provinco, nomata Ning Hua-tang. Ekde la jaro 1953, en la ŝafaro paŝtata de li aperis mirinda fenomeno: ĉiujare multaj ŝafinoj naskis po du ŝafidojn anstataŭ unu. En la jaro 1955, el la 28 duoble gravedigitaj ŝafinoj sub lia zorgo, 26 naskis po du ŝafidojn. En la lastaj 4 jaroj, la naskproportio de la ŝafinoj sub lia paŝtado superis 95 procentojn, kaj pli ol 95 procentoj de la ŝafidoj bone vivis.

## Maljuna ŝafisto

Ning Hua-tang kolektis kompletan da spertojn en ŝafpaŝtado, kaj trovis la regulojn de ŝafpaŝtado en ĉiu sezono de la jaro laŭ la ŝanĝiĝo de sezonoj, kreskado de herboj kaj la ŝafoj. Li trovis, ke en la printempo kreskas la ostoj de la ŝafoj, tial kurado estas evitinda; la somero kaj aŭtuno estas sezonoj por ĉiufanka kreskado de la ŝafoj, tial li trovas necesa “matene paŝti la ŝafojn kontraŭ la suno, ilin manĝigi per la malvarmetaj herboj, sub matenruĝo, multe manĝegigi tagmeze per varmaj herboj, posttagmeze ankoraŭfoje manĝigi hejmenirante”. Dank’ al tia paŝta metodo, ĉiuj ŝafoj sub lia zorgo estas grasaj.

Ning Hua-tang profunde pristudadis la vivkultimojn de la ŝafoj, kaj li kapablas konkludi el iliaj movoj kaj blekoj, kion ili volas. Kaj ankaŭ la ŝafaro kutime kondukis laŭ lia direktado. Foje sur montodeklivo, li trovis, ke la ŝafoj fiksrigardadas lin kaj eligas obtuzajn sonojn el la nazo kaj buŝo. Post atenta esplorado li trovis, ke lupoj

pluati la lokajn naturajn riĉaĵojn kaj konstrui en nia montregiono. Ĉiuj opiniis, ke prefere ni disvastigu la plantadon de aleŭrito\*\* kaj aŭrikulario\*\*\*, kiuj estas kaj profitodonaj kaj eksporteblaj. Ili ja estas du perloj en nia montregiono.

Post apenaŭ du tagoj, sekretario Ĝang de la gubernia partikomitato min telefonis: “Juna Du, ĉu vi scias, ke okazos baldaŭ granda impeto en via montregiono?” “Kial ne?” mi respondis. “Estante sekretario de partifilio, mi jam antaŭlonge ekagis.” “Kion vi decidis por la impeto?” li demandis. Mi respondis: “Ni montanoj, ĉiam nin vivtenas de la montoj. Krom batato, sezamo, aleŭrito, aŭrikulario kaj la bonkvalita lignokarbo ni ja trovas nenion alian. Sed iliaj produktokvantoj estos multobligitaj, ĉu tio ne estos jam granda impeto?” Mi aŭdis, ke li ekridis ĉe la telefono, tial mi demandis:

\*\* aleŭrito: arbo apartenanta al eŭforbiacoj, kies semo produktas lign-oleon havantan altan industrian valoron.

\*\*\* aŭrikulario: speco de manĝebla fungo kreskanta sur putra arbotrunko

“Pro kio vi ridas? Ĉu tio ne estas impeto?” Li respondis: “Kompreneble jes. Tamen vi ankoraŭ ne elsaltis el via malnova sulko.” Mi estis neniel konvinkita de lia respondo kaj volis refuti lin, sed li devigis min daŭre aŭskulti: “Ĉu ne estas la sekvanta popolkanto en via montregiono:

*Sub Guomintang-a regado,  
Vegetis ni per supo batata;  
Kaj nin vivtenas nun  
De la gren' provizata.  
Kiam ŝanĝiĝos  
Nia vivaĉo ĝisfunde,  
Ke eĉ forvendos  
Rizon kroman ni abunde? . . .”*

Mi demandis: “Kion vi volas aludi per tiu ĉi popolkanto, sekretario Ĝang?” Anstataŭ klarigi al mi sian intencon, li simple petis, ke mi bone pripensu mem kaj ĉeestu kunvenon en la guberniurbo post du tagoj.

Remetinte la telefon-ricevilon, mi ekmeditis. Iom poste mi komprenis lian veran intencon: Li ja volis, ke ni kreskigu rizon en la montoj! La ideo ekĝojigis min, ke mi eksaltis en la ĉambro.


## fariĝis profesoro

alproksimiĝas, kaj li tuj prenis paŝojn por protekti la ŝafaron.

Jam de kvar generacioj la familianoj de Ning Hua-tang servis al bienuloj kiel ŝafpaŝtistoj. Li mem ekpaŝtadis ŝafojn en sia ok-jara aĝo. En la malnova socio, lia familio sin vivtenis per paŝtado, kaj lia frato almozadis, lia fratino estis forvendita kaj liaj gepatroj mortis de malsato. La bienulo informiĝinte, ke li havas teknikon duoble gravedigi ŝafinon, lin turmentadis por tion elpremi, sed li diris nenion pri sia arto. Post la liberiĝo, liaj spertoj estas alte taksitaj de la popola registaro, kaj li tuj dediĉis sian sperton al la agrikultura kooperativo. Diversrangaj popolaj registaroj sendadis al li helpantojn por resumi liajn spertojn.

Lastatempe, la Agronomia Kolegio de Ŝanhi-provinco sendis al li unu profesoron kaj du diplomitajn studentojn por vivi kaj labori kune ĉe li, kun la celo helpi lin verki libron pri lia ŝafbreda metodo.

**Ning Hua-tang instruas al junaj paŝtistoj kiel kuraci senapetitecon de ŝafo.** Foto: Ma Ming



Sed tuj aperis en mia cerbo la vorto: "Neeble!" Post trankvila pripensado, mi konstatis, ke efektive tio estas neebbla! Konsideru: mankas akvo en nia montregiono, la vetero estas malvarma kaj la deklivo kruta. Krom kelkaj familioj ĉe l' montpiedo, neniu el ni konas rizkulturadon. Kiel ni povus kulturi rizon sub tiaj kondiĉoj? Tamen min ravis la ideo de sekretario Ĝang. Kiom ĝojinde estus, se sur niaj montoj kreskus rizo, kaj aŭtune la oraj spikoj kovrus la montaron. Jen vera granda impeto kaj radikala transformiĝo! En tiuj tagoj mi pensadis tage kaj nokte pri tio kaj eĉ vizitis la nurajn kvin muojn da rizkampo en nia *hiang*, ĉe la montpiedo, kaj ĝin rigardis absorbite por trovi rimedon kiel plej bone utiligi ĝin. Fine mi skizis planon je tiu irigaciata terpeco, ke ni konduku la akvon al tiuj kampoj supren al la ĉirkaŭaj kampoj iom altaj, kaj per tio ni transformu aliajn kvin muojn en rizkampojn. Ĉu tio ne estos granda antaŭensalto!

Je la tago kiam mi estis veturonta al la guberniurbo, mi sentis min tre fiera. Mi kredis, ke aŭskultinte mian planon, sekretario Ĝang nepre petos


min doni tipparoladon en la kunveno. Efektive, kiam mi atingis la guberniurbon kaj faris al la sekretario mian raporton, li diris ridetante: "Ankaŭ la via estas tipa ekzemplo. Vi parolu en la kunveno. . . ." La sekvintan tagon mi la unua parolis en la kunveno. Mi ne estas homo ĉirkaŭfrazema. Tial suririnte la podion, tuj mi diris rekte: "Gekamaradoj, ege impetos nia *hiang*, kie baldaŭ suprenleviĝos alta fluso transformi neirigacieblajn kampojn en irigaciatajn. Ni transformos kvin muojn. . . ." Apenaŭ mi finis tiun frazon, eksplodis ridego inter la aŭskultantaro. Iu laŭte kriis: "Kio menciinda en la kvin muoj? En nia *hiang* ja cent muoj transformiĝos. . ." Sekretario Ĝang ĉesigis la ridadon kaj petis min daŭrigi. Sed mi jam ne plu havis la inklinon daŭrigi la paroladon kaj post apenaŭ kvin minutoj mi retiriĝis de la podio. Je la fino de la kunveno sekretario Ĝang faris konkludon dirante interalie, ke mia parolado estis ankaŭ tipa ekzemplo, sed tipa konservativisme!

Tiun vesperon mi kuŝis ĉagrenita sur la lito. Sekretario Ĝang persone invitis min al sia ĉambro, kaj persvadis min, ke nia *hiang* devas transformi


## IMPETE DISVOLVIĜAS LA ĈINA EDUKADO

Antaŭ la liberiĝo, Ĉinio estis lando analfabetoza; sed nun, laŭ statistiko ĝis la 20-a okt. 1958, la elementagrada eduko jam populariĝis en 2,030 el la 2,257 urboj kaj gubernioj de Ĉinio, kaj 93.9% el niaj lernejaĝaj infanoj jam frekventas elementan lernejon. La sekvantaj grafikaĵoj ilustras la kreskadon de la element-lernejanoj, liceanoj kaj gestudentoj dum lastaj jaroj.


**ELEMENT-LERNEJANOJ**



**LICEANOJ**



**STUDENTOJ**



Noto: La jaroj kun \* estas la rekordaj jaroj antaŭ la liberiĝo de Ĉinio. Unuo — 1,000.


pli multe da muoj en irigaciatajn kampojn. Mi klarigis al li la malfacilon por eĉ la promesitaj kvin muoj, kaj asertis al li, ke neniom da konservativismo kuŝas en tio. Multegaj estis miaj kialoj kaj almenaŭ centojn mi citis. Kiam la koko kriis la kvaran fojon, ni estis ankoraŭ argumentantaj unu kontraŭ la alia. Rimarkinte la persistemon de sekretario Ĝang, mi povis nur cedi kaj pretervole konsentis aldoni unu muon. Mi diris: "Ni do transformos ses muojn. Tio jam atingis la kulminon kaj neniom ni povos pliigi plu." Ankaŭ sekretario Ĝang trovis nenian rimedon por min konvinki. Li do diris: "Nu, unue transformu ses muojn. Sed multe konsiliĝu kun la popolamaso, precipe kun la maljunaj kamparanoj. Ne estu tro subjektiva!" Buŝe mi jesis, sed ankore mi pensis; "Mi estas denaska loĝanto en la montoj. Ĉu mi ne scias, kiom da muoj povos esti transformitaj?"

La sekvintan matenon, anstataŭ endormiĝi mi rapidis hejmen. Eble pro ekscititeco kaj anima maltrankvileco, mi duonirante kaj duonkurante finis la tutan distancon de 60 kilometroj antaŭ la vesperiĝo. Antaŭ ol vespermanĝi, mi kunvokis ĉiujn partisekretariojn kaj prezidantojn de la kooperativoj al kunveno. Unue mi rakontis al ili, kiel oni rigardis mian raporton kiel tipon de konservativismo en la kunveno, kaj due mi sciigis al ili pri mia konsento fari unu plian muon en irigacian kampon kaj la intencon tuj ekagi. Fine mi demandis kiel ili opinias. Neniu min priridis. Kontraŭe, laŭ ilia mieno ili ankoraŭ min simpatiis. Mi do iom trankviliĝis kaj petis ilin bone konsideri kiamaniere transformi tiujn ses muojn. Post detala pripensado kaj diskutado ili finfine konkludis, ke la transformotaj kampoj ne povos superi 4½ muojn kaj asertis, ke mia cifero promesita en la guberni-urbo ja estis riskema. Mi ekkriis: "Ha! Vi estas eĉ pli konservativaj ol mi! Fulmotondro!"

Tiun nokton mi denove ne povis endormiĝi, forte pugnofrapante la kapon. Mi ellitiĝis, malfermis fenestron kaj malĝoje fiksrigardis la brilan lunon sur la ĉielo. Mi pensis: Depost la liberiĝo

ĝis nun, de kiam mi estis kuriero ĝis kiam mi estas sekretario de *hiang*-partikomitato, mi estis ĉiam progresema. Ĉu mi fariĝos ĉifoje konservativulo en la irigaciigo de kampoj? Se efektiviĝos la transformado de granda terspaco da irigaciataj kampoj en la montoj, mi daŭre pensis, tiam ni estos ne nur memsufiĉaj en nutraĵo, sed povos eĉ forvendi la superfluan grenon al la ŝtato. Krome, ni ankoraŭ multe enspezos per eksportataj montaj produktajoj. Kiel riĉa fariĝos la vivo de niaj kooperativanoj tiam! Sed kie estas la akvo, la bezonata akvo? Mi pensadis kaj pensadis, kaj fine endormiĝis min apogante sur la fenestra sojlo. Tuj kiam mi fermis miajn okulojn, mi sonĝis pri akvo... murmuranta akvo. Mi sonĝis pri rizo plene kovranta la montflankojn. Jen mi sonĝis, ke mi estas donanta mian tipraporton de konservativismo. Mi aŭdas la rideksplodon de la aŭskultantoj kaj vidas la kuntiritajn nigrajn brovojn de sekretario Ĝang. Sed kiam mi vekigis, prilumis ja nur la luno sur la ĉielo kaj restis nur la plano de la kvar muoj kaj duono, aŭ maksimume ses muoj... Ho ve! Mi estis katenita de tiuj diablaj ses muoj! En tia ĉagreno mi senkonscie direktis mian rigardon al la luno, kiu nerimarkite glitis okcidenten. Subite mi ekmemoris, ke okcidente de nia montvalo estas Luna Lageto, kien ordinare malmultaj iris. Mi ekdronis en meditado. Ĝi estis nomata "Lageto", do devas esti tie akvo.

### Mi ellitiĝis Vang kaj devigis lin akompani min al Luna Lageto



Alie, kial oni ne nomas ĝin "Luna Monto"? Tiel pripensinte, mi estis ravita kvazaŭ mi estus trovinta trezoron. Mi kuris al Vang Kaj-fa, prezidanto de Ruĝflora Kooperativo, kiu situas plej proksime de "Luna Lageto".

Mi ellitigis Vang kaj devigis lin akompani min al Luna Lageto. Kun dormemaj okuloj li demandis, ĉu mi ne freneziĝis. Mi respondis: "Mi ne estas freneza. Mi nur volas serĉi akvon." Li insistis, ke mi estas freneza, ĉar li diris, ne nur li neniam vidis akvon ĉe Luna Lageto, sed nek lia patro nek lia avo. Pacience mi klarigis al li la signifon de la vorto "lageto". Sed li nur skuis sian kapon kaj seke ridis. Tamen fine li kontraŭvole akompanis min tien.

Tre malproksime estas Luna Lageto, al kiu kondukas nur serpentuma montvojeteto. Kiam ni atingis la lokon, jam plene tagiĝis. Ĝi estis seka montvalo, kie eĉ flueto de akvo ne estis videbla. Sed mi ankoraŭ zorge serĉis tie kaj tie ĉi kun granda energio, jen palpante, jen fosante. Forpasis la antaŭtagmezo. La fosado dolorigis miajn ambaŭ manojn, tamen ni trovis eĉ neniun guton da akvo

por kvietigi nian soifon. Dume la stomako tordiĝis kun laŭtaj plendoj pro malsato. Vang Kaj-fa plurfoje urĝis min reveni. Mi pensis en mi mem: "Miaj hodiaŭaj klopodoj estas tute vanaj. Restas ankoraŭ la kvar muoj kaj duono."

Kiam mi revenis al mia oficejo, la suno estis subironta. Trovinte nenian akvon, mi povis apenaŭ reteni mian kolerecon. Tiam mi ekmemoris, kion parolis sekretario Ĝang ĉe nia disiĝo kaj decidis peti konsilon de kelkaj maljunaj kamparanoj. Post vespermanĝo, kiam mi estis elironta por viziti ilin, neatendite entrudiĝis avo Vang. Mi supozis, ke eble li refoje malpaciĝis kun sia filo kaj petos min admoni lin. Sed anhelante li demandis:

"Sekretario Du, ĉu vi serĉis akvon ĉe Luna Lageto hieraŭ vespere kun nia prezidanto?"

"Kio? ĉu estas akvo tie?"

"Nu, kiam mia avo ankoraŭ vivis, li diris al mi, ke antaŭe sin trovis akvo ĉe Luna Lageto kaj la akvo estis sufiĉe abunda. Li diris, ke tiam oni ankaŭ intencis transformi la agron malsupre de la lageto en rizkampon, sed ne sukcesis, ĉar oni ne kunlaboris unuanime. . . ."

## FLORU ĈINIO

*Alj Tokombajev, popola poeto de Kirgizio*

*Olda, preskaŭ samaĝa al tero mem,  
Ĝi plenforte leviĝis por nova jun'.  
Pli sennombras ol steloj ĝia popol'  
Kaj renversas la nokton kvinstela lum'.*

*La Patrino la nobla granda Parti'  
Liberigis por ĉiam de l' fera ĉen',  
Lavis for inunde popola koler'  
Daŭran jugon, regnon de trist' kaj ĉagren'.*

*Kaj la volo triumfa, kvazaŭ vulkan',  
La oldmondon bruligis, disventis for....  
Tiel helas rejuniginta Parti',  
Karesante siajn gefilojn ĉe l' kor'.*

*Ili tiom suferis dise de ĝi,  
Tiom daŭris doloro, tristo sen fin'.  
Des pli karas nun la feliĉa renkont',  
Des pli forte la koroj ekamis ĝin.*

*Eĉ la oldaj sentas revenon de jun'.  
Ree rektas iliaj dorsoj en ver',*

*Ĝojaj larmoj ekbrilas en la rigard'  
Relumante printempon de l' hejma ter'.*

*La dezertojn vivigis rivera sang',  
Forte batas la koro de industri',  
Kiel vejnoj, tiriĝas nova vojar'—  
Tiel belas disfloro de la Patri'.*

*Indas mokojn la fremda transmara drak',  
Dolarkapojn siajn levanta en van':  
Senrezulte hodiaŭ incitas ĝi  
Tiun vulpon de sklavigita Tajvan'.*

*Restos baldaŭ sendenta la olda best'—  
Ĝiajn dentojn forbatos granda Ĉinland',  
De l' insuloj—belgrajnoj de l' kontinent'  
Viŝos for sangajn signojn de l' aĉa band'.*

*Ho lumanta kiel printempa sun',  
Alta kiel Tianŝan-montaro, Ĉini'!  
Por tutmonda feliĉo disfloru nun,  
Karaj fratoj, kun vi estas ĉiam ni.*

**El kirgiza lingvo tradukis K. Gusev**



“Ĉu efektive?” Mi senĉese frapetis la ŝultron de avo Vang.

“Mi ne kuraĝas tiel diri. En la tempo de mia patro, neniu vidis plu akvon en la lageto. . . Kiom ideale, se tie ĝi estus! Tiam ni povus transformi la teron en irigaciajn kampojn kaj ne plu bezonus ĉiujare grandan homforton por alportado de proviza greno el aliaj lokoj.”

“Tie devas esti akvo! Tie devas esti! . . . Nun ni iru kaj serĉu denove! . . .” mi diris kaj ĝojplene kaj senpacience.

Tiun vesperon mi faris mobilizan paroladon en Ruĝfloro-kooperativo, instigante ĉiujn iri al Luna Lageto por serĉi akvon. Tio signifas ja serĉi oran rizon. Laŭ la mieno de l' ĉeestantaro mi rimarkis, ke ĉiuj estas volontaj, escepte de kelkaj personoj, kiuj palpebrumas, blovis nazon, oblikve rigardis. . . Mi decidis, ke ni kune iru frumatene la sekvintan tagon trans la montoj al Luna Lageto por ĝin traserĉi. Tiun nokton mi pasigis en la hejmo de Vang Kaj-fa. Oni diris, ke tuj post la mobiliza kunveno, kelkaj anoj de l' Komunista Junula Ligo kaj kelkaj milicanoj jam ekiris kun torĉoj al Luna Lageto. Ĉe la tagiĝo de la sekvinta tago, la tuta Luna Lageto estis preskaŭ renversita.

Dum kvar sinsekvaj tagoj kaj noktoj ni streĉe laboris de frua mateno ĝis profunda nokto. Ni elfosis ĉiujn arbustojn kaj herbaĉojn ĉe Luna Lageto. Sed elfluis ankoraŭ neniam akvo. La entuziasmo de l' amaso iom post iom malgrandiĝis kaj multaj min rigardis per paro da senhelpaj okuloj. Kelkaj malprogresemaĵoj mezriĉaj kamparanoj eĉ faris jenan kanton por min mokridi:

*Bongusta, dolĉa ja la rizo,  
Sed por batato niaj buŝoj destinas.  
Eĉ gut' da akvo ne troviĝos,  
Kvankam terrenverson ni obstinas.*

Tion aŭdinte mi ege koleris kaj diris al la popolamaso, ke kiam ni estos trovintaj akvon kaj per ĝi kreskos la rizo, ni devas puni ilin manĝi bataton tutajn tri jarojn, sed ne rizon.

En la nokto de la sepa tago, avo Vang ektrovis sub sia torĉo, humidan lokon ĉirkaŭ dekkvadratafutan, plenkovritan de musko, sub rokego ĉe la okcidenta angulo de Luna Lageto. Avo Vang diris,



### **Ili klopodas elfosi la plej grandan kaj plej profunde enradikiĝintan rokon.**

ke akvo eble kuŝas sub tiu rokego. Sekve, mi petis ĉiujn veni ĉi tien por elfosi ĉiujn rokblokojn. Je la dua horo nokte, kiam ni elfosis la plej grandan kaj plej profunde enradikiĝintan blokon, tuj elŝprucis torenta akvo. . .klara kaj freŝa fontakvo. Ĉe tiu momento, ĉiuj frenezigiĝis pro ĝojo. Kelkaj eĉ eksaltis ĉirkaŭprenante unu la alian, kiel oni vidas en la filmo. La ĝojkrioj: “Vivu Prezidanto Maŭ” kaj “Vivu la Komunista Partio” preskaŭ tremigis la tutan Lunan Lageton. Kompreneble, la sekvintan tagon ni komencis fari kanalojn por transformi ĉiujn ducent muojn da maizkampoj ĉirkaŭ Luna Lageto en irigaciajn kampojn.

Apenaŭ du tagojn post kiam mi revenis al la *hiang*-oficejo, venis sciigo de la gubernia partikomitato, ke mi ĉeestu la “Kunvenon por Interŝanĝi Spertojn en la Granda Impetado”. Mi pensis, ke ĉi tiun fojon mi jam havas kapitalon. Anstataŭ kvin muojn, ni transformos ducent. Jam kelkdekoble pli ol antaŭe. Ĉu tio ne estas surpriza? Ĉu tio ne estas impeta? La ĝojon mi intence kaŝis, kiam mi renkontis sekretarion Ĝang en lia oficejo. Sed tuj li travidis min kaj demandis:

“Ĉu ĉifoje jam ne nur kvin muoj?”

“Kompreneble ne!” mi respondis, kaj post intenca paŭzo mi daŭrigis malrapide: “Mi ne

# Tri en mateno kaj kvar en vespero

Iam troviĝis simio-bredanto, kiu amis simiojn kaj bredis ilin en granda nombro.

Li povis kompreni ilin, kaj ili lin. Li kutimis malpliigi la nutraĵojn de sia familio por kontentigi ilin.

Baldaŭ manko de nutraĵo akre sentiĝis en la hejmo. Li volis limigi la porciojn de la simioj. Tamen li timis, ke ili fariĝos malobeemaj, kaj decidis ilin trompi.

“Mi donos al vi tri kaŝtanojn en la mateno kaj kvar en la vespero,” li diris. “Ĉu tio sufiĉas?”

Ĉiuj simioj leviĝis por esprimi sian koleron.

Momenton poste, li diris: “Nu, do mi donos kvar en la mateno kaj tri en la vespero. Ĉu tio sufiĉas?”

La simioj denove kaŭriĝis sentante sin tute kontentaj.



Ilustris Fong Zi-kaj

— El “Liezi”

raportas la planon al vi nun, sed ĉion parolos en la kunveno. Ĉu bone?”

“Ha! Ĉu vi volas surprizi min en la kunveno? Nu, mi aŭskultos la vian tiam.”

Tiun nokton mi loĝis en la gastigejo de 1<sup>a</sup> gubernia partikomitato. Apud mi estis la partisekretario de la najbara *hiang* Fajrero, kiu estis rigardata kiel ‘porkvosta’ pro ĝia ĉiama postiĝinteco. Mi ne sciis, kiel ili agas dum la movado de granda impetado. Enlitiĝante, li demandis min: “Juna Du, kiom da muoj via *hiang* transformos en irigaciatajn kampojn?” Kun fiereco mi etendis du fingrojn, ridetante. Surprizite li eligis sian langon kaj diris: “Ho! Mirinde! Ĉu vi en la montoj transformos du mil muojn? Vere ĉiam modela kaj konforma al la famo! Jen vidu, ni povas nun transformi nur mil kvincent muojn, kvankam duono de nia *hiang* estas ebenaĵo. Ĉifoje ni denove devas lerni de vi.”

Tion aŭdinte mi sentis kvazaŭ mutulo glutinta amaran pilolon ne povante plendi la amarecon. La grandan ĝojon, kiun mi sentis ekde kiam mi estis hejme, tute forlavis ĉi tiu sitelo da malvarma akvo. Ho ve! Mi ankoraŭ intencis surpodiiĝi por fari paroladon. Feliĉe mi renkontis la partisekretaron de Fajrero-*hiang*, alie mi fariĝus denove

tipa ekzemplo de konservativismo. Kuŝante sur la lito, mi enpeniĝis. Tiu ĉi impetado estas ja surpriza. Oni vetkuras en jetoj. Nia *hiang* ankau vetkuras, sed piede. Kiel ĝi povus konkuri kun aeroplanoj! Rigardu! Eĉ Fajrero-*hiang* jam superis nian, la “modelan.” Kia impeto estas la nia?

La partisekretario de Fajrero-*hiang* ankoraŭ senĉese babilis, dirante, ke la sekvontan tagon mi nepre faros tipparoladon de progresinteco kaj ke estas efektive malfacile transformi du mil muojn en la montregionoj. . . . Ju pli mi aŭskultis, des pli mi ne povis plu elaŭskulti. Mi kovris mian kapon per la litkovrilo kaj el miaj okuloj, mi ne sciis kial, elfuis larmgutoj. Mia pasinta ekscitiĝemo en la tempo, kiam mi estis kuriero, refoje elmontriĝis!

En la kunveno la sekvantan tagon, mi sidis plej malantaŭe. Oni raportis sinsekve la kvantojn de transformotaj irigaciataj kampoj. Multaj anoncis du mil aŭ tri mil muojn, aliaj kvin mil aŭ ses mil, dum kelkaj eĉ sep mil aŭ ok mil, sed neniu menciis la ciferon kelkcent. Sekretario Ĝang okulsignis al mi kelkfoje, invitante min surpodiiĝi. Sed kiel mi kuraĝus! Tuj mi skribis al li slipon, sciigante lin, ke mi volas rekonsideri la planon kaj sekve ne parolos hodiaŭ. En mia cerbo zumadis du mil, tri mil. . . sep mil, ok mil. . . Kiom kapdolorige!

La kunveno finiĝis. Vespere, kiam mi sidis sola en la gastejo kun peza koro, al mi venis sekretario Ĝang. Ho, mi forgesis menci, ke li estis mia antaŭa superulo. En la pasinteco, kiam li estas sekretario de distrikta partikomitato, mi estis lia kuriero. Li plej bone konas mian humoron. Li povas diveni, ĉu mi estas bonhumora aŭ malbonhumora. Eble li jam sciis, ke mi estas en ĉagreno kaj venis por kuraĝigi min. Sed ne! Tute neatendite, li proponis viziti la kulturan domon por aŭskulti programon de la tambur-balado†. Mi diris: "Mi ne emas iri nun, ĉar mi ne havas tian inklinon." Sed li insistis: "Juna Du, pli bone iru kun mi, ĉar hodiaŭ oni kantos nove adaptitan Sovetian rakonton."

"Kia estas Sovetia tambur-balado?" Efektive mi tion aŭdis nur la unuan fojon. Ĉu la tambur-balado ankaŭ taŭgas por Sovetiaj rakontoj? Sed vole-nevole fine mi kuniris kun li. La kultura domo estis plenigita de vizitantoj. La juna administrantino, kiu faris enkondukan parolon, diris, ke la hodiaŭa tambur-balado kantos pri adaptita Sovetia rakonto "Tempo, Antaŭen!" de iu Katajev. Ili prezentas tiun baladon por la movado de la granda impetado. En la komenco al mi estis tute egale, ĉu ĝi estis Sovetia rakonto aŭ ĉina, ĉar ĉiel ajn ĝi povos doni al mi nenian helpon. Mia koro estis for de la kantejo, kvankam mia korpo tie restis. Sed la baladkantisto estis tiel lerta, ke en la daŭro de lia ritma rakontado mia animo entute kaptiĝis. Ravite mi lin fiksrigardis, sorĉita de ĉiu vorto kantata. La rakonto estis efektive kortuŝa. Tiu Jeŝ. . ĉinko estis vera heroo. Sed ĉiu nova rekordo ĵus starigita de li kaj liaj kolegoj estas ofte tuj rompita de aliuloj. Vere "Tempo, Antaŭen!" Mi ekmemoris same pri miaj ducent muoj. Mi rigardis ĝin nova rekordo, sed ĉu oni ne tuj ĝin superis jam antaŭ ol mi anoncis ĝin al la publiko?

Kiam finiĝis la tambur-balado, sekretario Ĝang frapetis mian ŝultron kaj demandis: "Kiel vi pensas? Vi ne venis vane, ĉu?"

"Tute ne! Nun mi deziregas tuj reiri hejmen."

"Bone! Reiru hejmen kaj mobilizu la popolamason al pli vigla konkurado. En nia granda impetado ĉiam unu superas la alian. Neniu scias ankoraŭ nun, kiu estos la plej antaŭa."

Nur tiam mi raportis al li ĉion pri niaj klopodoj por transformi la teron ĉirkaŭ Luna Lageto en irigaciatajn kampojn. Mi promesis, ke mi devas lerni de tiu Sovetia heroo Jeŝĉinko kaj ne kontentiĝi per la nuraj ducent muoj. "Kiomfoje vi povos multobligi sur tiu ĉi bazo?" li demandis min ridet-

ante. Mi ruĝiĝis kaj ne kuraĝis respondi, ĉar mi estis ankoraŭ ne certa pri tio. Fine mi kolektis sufiĉan kuraĝon kaj respondis: "Eble ni duobligos aŭ triobligos ĝin."

Sekretario Ĝang rimarkis, ke mi respondis sen memfido. Li silentis dum momento kaj poste diris: "Se vi vere volas lerni de Jeŝĉinko, vi devas unue kuraĝe pensi kaj poste kuraĝe agi. Ĉu ne?"

"Prave!" mi respondis.

"Kial do vi ne faros vian montregionon memsufiĉa en rizprovizado? Tio estas ja minimuma antaŭensalto!"

"Ti. . . o ja bezonos ok mil muojn da irigaciataj kampoj. Ankaŭ mi iam pripensis pri tio. . . ."

"Bone, se vi iam tion pripensis. Do restas nun nur la paŝo 'agi'. Vi do hejmeniru morgaŭ frumatene."

Kun plena memfido mi revenis hejmen. Anstataŭ eniri la *hiang*-oficejon, mi rekte vizitis Ruĝflor-kooperativon, kie mi trovis neniun hejma krom kelkaj maljunulinoj vartantaj infanetojn. Ĉiuj aliaj partoprenis la fosadon de kanaloj ĉe Luna Lageto. Alveninte al la lageto, mi vidis eksterordinare vivecan scenon. Tondras popolkantoj unu post la alia, vere bolas entuziasmo. Mi forestis apenaŭ tri tagojn, sed la kanalo serpentumas jam mezvoje sur la montdeklivo kaj ĉirkaŭ 40% de la tero estis transformitaj en irigaciatajn kampojn. Kvankam la laboro estis plenumata sen iu ajn inĝeniero, la akvo estis tiel obeema ke ĝi fluis kien ajn laŭ nia plaĉo. Vere la popolo mem estas la plej grandaj kaj rimedoplenaj inĝenieroj. La nivelo, kiun la popolanoj faris el bambutubo kaj tegolpeco, estis tiel efika, kiel tiu germana fabrikaĵo, kiun la akvokonserva departemento aĉetis por kelkcent jŭanoj.

Antaŭe mi pripensis ĉirkaŭ kvin muoj ĉe 1' montpiedo. Ĉifoje mi absorbiĝis en la plena utiligo de Luna Lageto. Mi kunvokis apartajn kunvenojn por maljunaj kamparanoj, kooperativaj kadroj, junaj kamparanoj, k. a., petante, ke ĉiuj elpensu rimedojn kaj prezentu proponojn. La kadroj kaj la popolamaso estis tre entuziasmaj kaj tuj centoj da proponoj estis prezentitaj. Iu diris, ke ni serĉu pliajn fontojn ĉe Luna Lageto. Alia prezentis rimedojn por ŝpari akvon kaj hompovon. La tria proponis, ke ni plej bone utiligu teron laŭ situo: la krutan deklivon transformi en ŝtuparajn kampojn kaj la kavan teron en terasan. Ankoraŭ alia asertis, ke se ni starigos bambutubojn, por konduki akvon trans la montojn, pli multe da kampo povos esti irigaciata. Tage kaj nokte mi studis tiujn proponojn kun la kadroj kaj provis la rimedojn unu post la alia. En malpli ol duonmonato, aliaj

† *tambur-balado*: populara formo de ĉina ritma rakontado kun tamburino kaj tintilo.

du fontoj estis trovitaj ĉe Luna Lageto. Ankaŭ la utiligon de la akvo oni laŭeble raciigis (Ĉiun guton da akvo ni rigardis vere kiel guton da sango). Ĉio ĉi tio donis al ni garantion, ke ni povos transformi du mil muojn en irigaciatajn kampojn, t. e. preskaŭ du trionojn de 1' tuta monta tero de Ruĝa Floro. Ĉu tio ne estis surpriza? Kvankam mi iomete malgrasiĝis, tamen tiun ĝojon en mia koro, ho, mi ne havas taŭgajn vortojn por priskribi!

Mi telefonis al sekretario Ĝang, sciigante al li la atingon. Kompreneble li ankaŭ treege ĝojis. Sed li ekdemandis strangan demandon: "Ĉu sin trovas en via *hiang* nur unu Luna Lageto?" "De la antikva tempo ĝis hodiaŭ," mi respondis, "sin trovas ja nur tiu ĉi sola 'Luna Lageto'. Kie troviĝas iu alia? Mi povas nek mensogi nek krei iun por vi." "Certe mi ne volas, ke vi mensogu," Ĝang diris," sed mi ja volas, ke vi kreu iun novan 'Lunan Lageton'." "Kiel?" mi demandis. "La Lunan Lageton kreis ja la naturo." "Ankaŭ vi tion

povas, se nur vi ne najliĝas en la sfero de Ruĝ-flora-kooperativo kaj rondiras en la sama loko. Tre vasta ja estas via *hiang* kaj sin trovas ankaŭ multaj aliaj montoj."

Lia parolo donis tuj al mi novan energion, kvazaŭ fiŝo returnita en akvon. Efektive! Kial mi ne pripensis pri tio pli frue? Kial mi estis absorbita nur de la malnova Luna Lageto? Kial ne povas esti Lunaj Lagetoj en aliaj montoj? Kial ne povas esti fontoj en aliaj montoj?

Ekde tiu tago portante mian litajpakon mi iris de kooperativo al kooperativo kaj de monto al monto en nia *hiang*. Kien ajn mi alvenis, ĉirkaŭita de tieaj kamparanoj, kiuj rigardis min kiel simbolon de akvo. Tiam en nia *hiang* efektive "Ĉiu serĉas fontojn kaj ĉiu kooperativo konstruas por irigacio. Entuziasmigaj estis tiuj tagoj. La popolanoj trakuris ĉiujn montojn por eltrovi fontojn kaj avo Vang la Dua fariĝis "inĝeniero por akvokonservado" de ĉiuj kooperativoj. Post apenaŭ



## Paĝo el la ĉina historio :

# La Kulturo de la Epoko de la Militantaj Regnoj

## A. Mozi, Hjunzi, kaj Hanfej

Multaj famaj pensuloj vivis en la tempo de la Militantaj Regnoj. Ili verkis multe da libroj publikante siajn politikajn opiniojn.

**Mozi** Mozi estas respekta nomo de Mo Di, kiu naskiĝis en la komenco de tiu epoko. Li havis grandan nombron da disĉiploj, kiuj sekvis kun alta estimo liajn vortojn. Por plenumi la taskon donitan de la majstro, ili estis pretaj eĉ oferi sian vivon.

La fundamenta penso de Mozi estas "ami ĉiujn sendiference". Li opiniis, ke la homoj devas ami sed ne malami unu la alian. Li kontraŭis al invadmilito, sed subtenis sindefendon kontraŭ invado. Informite ke Ĉu-lando intencas invadi Songlandon, li rapidis piedirante dek tagojn kaj dek noktojn al Ĉu por malkonsili tion al ĝia regnestro kaj samtempe li sendis tricent disĉiplojn por helpi al Song en la defendado.

Mozi konstatis ke la peza suferego de la popolo estas malsato, frosto kaj lacego, kaj dume la

nobelaj vivas en lukso. Li opiniis, ke la plej absurda afero estas tio ke oni entombigas, kune kun la mortinto, ankaŭ multon da altvalorajoj. Mozi kondamnis malŝparon kaj lukson, kondamnis rabadon al la popolo. Li mem vivis ŝpareme.

Mozi estis eminenta laborulo. En lia verko "Mozi", redaktita de liaj disĉiploj, konserviĝis multaj scioj de la natura scienco akiritaj el la produkta laboro.

**Hjunzi Kaj Hanfej** Hjunzi (propre nomata Hjun Kuang) estis Ĝaŭ-landano. Li vizitis multajn landojn. Plej

longtempe li loĝis en Ki- kaj Ĉu-landoj. Hjunzi havis ankaŭ multe da disĉiploj, kiuj lernis ĉe li la klasikajn verkojn kompilitajn kaj redaktitajn de Konfucio. Hjunzi asertis, ke la homoj kapablas konkeri la naturon kaj ĝin utiligi por siaj bonoj, kaj ke la stelofalo, suneklipso ktp. estas nur naturaj fenomenoj, kiujn oni ne bezonas timi. Tio estas granda progreso de la homaro en konado pri la naturo.

unu monato ĉiuj kooperativoj trovis fontojn en siaj valoj. Enkalkulante tiujn en Luna Lageto, ni eltrovis entute naŭ fontojn. Ili ĉiuj estis novaj "Lunaj Lagetoj" kreitaj per niaj propraj manoj. Ni eĉ trovis fonton sur "Ĉiel-skrapanta Monto", la plej alta monto en nia distrikto. Per tiuj naŭ fontoj ni povas facile transformi 15,000 muojn en irigaciatajn kampojn. Nun ni jam transformis kvin mil. La kooperativanoj ne volis ripozi eĉ je la novjara tago aŭ dum printempa festo, malgraŭ tio ke mi, partisekretario, eĉ ordone malpermesis ilin labori. Ilia entuziasmo tute similas al Feliĉa Fonto, kies ŝprucon neniu povas haltigi. Se vi demandas, kiom da muoj ni ankoraŭ povos transformi estonte, nur la amaso povas vin respondi. Ili decidas la ciferojn. Se mi dirus dudek mil aŭ tridek mil muojn, eble mi estus ankoraŭ konservativa. Ĉu vi scias, kiom da Feliĉaj Fontoj sin trovas en niaj montoj? Plie, ĉiuj niaj kooperativanoj estas unuarangaj laboremuloj.

Antaŭ proksimume unu semajno, sekretario Ĝang invitis min telefone ĉeesti kunvenon en la guberni-urbo denove por interŝanĝo de spertoj. Ĉi tiun fojon mi ne petis permeson por paroli, sed Ĝang tiel aranĝis, ke mi refoje estis la unua paroladanto.

Kun facilaj paŝoj mi supreniris sur la podion. "Ĉu vi scias, kiom da muoj ni intencis transformi en la komenco?" mi komencis. "Kvin muoj. . . ." Refoje eksplodis ridego inter la aŭskultantaro. Sed mi resis aplomba. "Ne ridu, gekamaradoj! Aŭskultu, kiom da muoj ni nun impetas. Dekkvin mil muoj . . . ." La ridantoj tuj ĉesis ridi. Kelkaj eĉ ekmontris sian langon pro mirego. Post momento da silento eksplodis arda longa aplaŭdo. Kiam ĝi mallaŭtigis, mi finis mian paroladon per jena frazo: "Alie, kiel ni povus nomi ĝin granda impeto!" La aŭskultantoj kompreneble ridetis.

### Esperantigis Pandiŝo



Han-landano Hanfej estis disĉiplo de Hjunzi. Li opiniis, ke la potenco de la regnestro devas esti plifortigita kaj la regantaj aristokratoj devas esti anstataŭigitaj per oficistoj nomataj de la regnestro. La tuta potenco devas esti alcentrigita en la manojn de la regnestro. La ĉefministro kaj la generaloj devas esti ekzamenitaj kaj elprovitaj en la praktika laborado kaj promociataj paŝon post paŝo de la regnestro. La leĝoj kaj dekretoj faritaj de la regnestro devas esti skribe publikitaj al la popolo kaj ĉiu ajn en la tuta lando devas senescepte ilin observi.

La verko de Hanfej estis portita en Kin-landon, kies reĝo Jing-ĝeng legis ĝin kun kontento kaj volis lin vidi. Li sendis armeon por ataki Han-landon, kaj postulis liveron de Hanfej. Kiam Hanfej venis en Kin-landon, la reĝo tre ŝatis lin, sed poste li suspektis, ke li ne volas sin doni al Kin kaj lin mortigis. La politikoj, kiujn aplikis Kin-dinastio post la unuigo de Ĉinio, estis bazitaj sur la teorio de centraliza monarkismo de Hanfej.

### B. Literaturo kaj Scienco

**Kju Juan Kaj Lia "Lisau"** En la epoko de la Militantaj Regnoj, brile disfloris la literaturo, kaj Ĉu-landano Kju Juan (340 a.K. - 278 a.K.) estis ĝia plej granda literaturisto.

En tiu tempo, Kin trompis Ĉu-landon intrigante por, ke la lasta rompu sian rilaton kun Kinlando. Subaĉetite de Kin, iuj altrangaj oficistoj konsilis tion al la reĝo de Ĉu-lando. Sed al ili

Kju Juan

Brikogravuraĵo de Ma Da



kontraŭstaris Kju Juan. Tamen la reĝo ĝuste havis plenan konfidon al la unuaj kaj ekzilis la lastan. Fine Ĉu rompis efektive la rilaton kun Ki. Tiam Kin ekatakis kaj venkis Ĉu-landon. Kun ĉagreno kaj indigno Kju Juan skribis multe da poemoj plenaj de arda emocio.

Kju Juan trovis nenion alian pli aminda ol sian patron. Li havis profundan amon al la montoj, riveroj, arboj kaj herboj de sia patrolando. Li priskribis foje kaj refoje la belajn Dongting-lagon kaj Hiangŝuj-riveron kaj la aromajn herbojn kaj orkideojn.

La longa poemo "Lisaŭ" de Kju Juan estas senmorta majstraĵo, en kiu li diris, ke li deziras dediĉi sin al la patrio, sed la reĝo de Ĉu ne povis lin konfidi, kaj li ege malamamis la naci-perfidulojn. Li fantaziis, ke li forveturas de Ĉu-

lando en veturilo tirata de fluganta drako. La veturilo flugas en la aero, la nuboj lin protekte ĉirkaŭas kiel flagoj kaj feniksoj flugas kantante apud li. Li transpasas la altan montegon Kunlun, grandan dezerton de fluanta sablaro kaj fine li atingas la vastan Maron Okcidentan. Sed turninte malantaŭen la kapon li ekvidas sian hejmlandon kaj lin tiras returnen el lia revo de forvojaĝado la forta pasio patriota.

**Scienco** Havante la instrumentojn el fero la laboranta popolo jam pli bone kaj pli efike luktis kontraŭ la naturo, kaj ekvenkis la malfacilojn kiujn oni antaŭe opiniis ne subigeblaj. Oni ne nur konkeris la montojn, arbojn, herbejojn turnante ilin en agrojn, sed ankaŭ jungis riverojn por irigaciado de la kampoj, kaj la maron



Tomu:

## KVINA LECIONO

1. Nín hǎo!  
*Bonan sanon al vi!*
2. Wǒ fēicháng gāoxìng hé nín rènshi.  
*Mi tre ĝojas interkoniĝi kun vi.*
3. Ràng wǒ jièshào zìjǐ, wǒde míngzi jiào. . .  
*Lasu min prezenti min mem, mi nomiĝas . . .*
4. Qǐng yūnxū wǒ zhīdao nínde xìngmíng hé zhīyè.  
*Bonvole permesu min sciigi pri via nomo kaj okupo.*
5. Wǒ shì yíge jīxièshī (xīnwén gōngzuòzhě, jìzhě diànyǐng dǎoyǎn, yǎnyuán, dàxuéshēng,

jiàoshòu, yīnyuèjiā, yīshēng, huàjiā, huàxuéjiā, wùlǐxuéjiā, gōngchéngshī, chuánjiàoshì, lǚshī, jiànzhùshī).

*Mi estas maŝinisto (ĵurnalisto, raportisto, filma reĝisoro, aktoro, kolegia studento, profesoro, muzikisto, kuracisto, pentristo, kemiisto, fizikisto, inĝeniero, pastro, advokato, arkitekto).*

6. Wǒ cóng Sūlián lái.  
*Mi venas de Sovetio.*
7. Wǒ shì qīngzhù nǐmen de guóqīngjié lái de.  
*Mi venas por festi vian nacian tagon.*
8. Wǒ shì dàibiǎotuán de tuányuán.  
*Mi estas membro de la delegacio.*
9. Wǒmen shì yìng Wénhuàbù de yāoqǐng lái fāngwèn Zhōngguó de.  
*Ni vizitas Ĉinion pro la invito de la Ministrejo de Kulturo.*
10. Wǒ shì yí jìzhě de shēnfèn lái Zhōngguó de.  
*Mi venas al Ĉinio kiel ĵurnalisto.*
11. Nǐ huì jiǎng yīngyǔ ma?  
*Ĉu vi scipovas paroli angle?*  
Bú huì (huì yìdiǎnr).  
*Ne scipovas (scipovas iomete).*
12. Tā duì nǐ shuō shénme?  
*Kion li diris al vi?*  
Tā shuō, tā shì dì-yí cì lái fāngwèn Zhōngguó, yào wǒ gěi tā zhǎo yí-wèi yìyuán.  
*Li diris, ke estas la unua fojo por li viziti Ĉinion, kaj petas min trovi por li interpretiston.*

por navigado. Kun la pliriĉigado de la produktaj spertoj disvolviĝis la scienco.

Tiutempe, oni jam havis riĉajn geografiajn sciojn, kiuj ebligis registradon de la ĉefaj montoj, riveroj kaj diverslokaj produktaĵoj en la lando. Oni disvolvis pluen astronomion dank' al la agrikultura produktado kaj pliprecizigis la kalendaron. Estis fiksitaj la jardividoj (nomata *gieki*), kaj la kalendaro anoncis, ĉe kiuj jardividoj aperas kiuj naturaj fenomenoj, ekzemple: ĉe printempa ekvinoxo ekmuĝas la tondro kaj ekkukuas la kukoloj. Oni tiel povis pli science direkti la agrikulturadon. Oni batalis kontraŭ malsanoj kaj disvolvis medicinon. Centoj da drogoj estis registritaj en la libro titolita "Ben Caŭ". Alia libro titolita "Nej Ging" eksplikas la homan fiziologion kaj la sekreton de kuracado.

13. Nǐ gēn tā jiāotán yòngde shénme huà?  
*Kiun lingvon vi uzas interparolante kun li?*  
 Wǒ gēn tā jiǎng Shìjièyǔ, yě jiǎng yīngyǔ.  
*Mi parolas kun li Esperante kaj ankaŭ angle.*

14. Zhè liǎng-běn Běijīng yóulǎntú nǎ yì-běn hǎo?  
*Kiu el tiuj ĉi du turismaj mapoj de Pekino estas pli bona?*  
 Zhè yì-běn hǎo, nà yì-běn shì bùhǎo de.  
*Tiu ĉi estas bona, la alia estas ne bona.*  
 Zhè yì-běn wǒ kěyǐ gěi tā, kěshì nà yì-běn wǒ bùnéng gěi tā.  
*Tiu ĉi mi povas doni al li, sed la alian mi ne povas doni al li.*

15. Nàxie rén dōu shì nǐde tóngshì búshì?  
*Ĉu tiuj homoj estas viaj kolegoj?*  
 Shìde, tāmen dōu shì wǒde tóngshì.  
*Jes, ili ĉiuj estas miaj kolegoj.*  
 Zhèxie shū hé bàozhǐ dōu shì shuíde?  
*Kies estas tiuj ĉi libroj kaj ĵurnaloj?*  
 Zhèxie dōu shì túshūguǎn de.  
*Ĉio ĉi tio apartenas al la biblioteko.*

16. Tā shuōde zhōngguó-huà nǐ dōu míngbái ma?  
*Ĉu vi tute komprenas la ĉinan lingvaĵon, kiun li parolas?*  
 Míngbái (bú dà míngbái).  
*Komprenas (ne tute komprenas).*

17. Nǐ zhède fángzi hǎo-bùhǎo?  
*Ĉu la ĉambro de vi loĝata estas bona?*  
 Hǎo!  
*Bona!*

## GRAMATIKO

1. La vorteto "de" devas esti metata post adjektivo aŭ grupo da vortoj esprimanta agon faratan aŭ suferatan de la subjekto kaj ludanta rolon de adjektivo, se antaŭ la adjektivo aŭ la vortgrupo staras verbo "shì" (7,9,10,14). Ĝi do, helpe de "shì" diras ke la subjekto estas io aŭ iu tia, kia esprimas la antaŭstaranta adjektivo aŭ frazero.

2. Se post verbo sekvata de objekto oni almetas sufikson "de", la rilato inter ili ŝanĝiĝas en tiu inter determinanto kaj determinato, ekz.: shuō huà (eldiri parolajon); shuōde huà (eldirita parolajo). (16. shuōde zhōngguó-huà; 17. zhède fángzi).

3. "Gěi" ludas rolon de prepozicio "al, por", kiam en la frazo troviĝas ĉefa verbo (12. gěi tā). Ĝi ludas rolon de verbo "doni", kiam en la frazo ne troviĝas alia ĉefa verbo (14. gěi tā).

4. Kěyǐ—por esprimi permeson, eblecon (14). Neng—por esprimi eblecon kaj pli ofte kapablecon (14).

5. Gēn—sekvi, kun, kaj, ĉe. Duì—prava, kontraŭ, kun, al. Kiam "gēn" kaj "duì" ludas rolon de prepozicio, ili, kiel aliaj prepozicioj, staras kun sia komplemento antaŭ la predikato (12, 13).

6. Post "zhèxie" (tiuj ĉi) kaj "nàxie" (tiuj) kalkula vorto ofte ne estas uzata (escepte ĉe "zhèxiege"—tiuj ĉi kelkaj). Des pli ne numeraloj. Oni ne diras, "zhèxie sān zhī gāngbǐ" sed: "zhè sān zhī gāngbǐ" (tiuj ĉi tri plumoj).

7. Kelkfoje la objekto sin trovas je la komenco de frazo. Sed la subjekto nepre staras najbare antaŭ la predikato (14, 16).

## VORTARO

bu — ne	gēn — kun
bùhǎode — malbona, nebona	guóqìngjié — nacia festo
bùnénɡ — ne povi	hǎo — bona
búshì — ne esti	hǎo-bùhǎo — bona aŭ malbona?
cóng — de, el	hé — kaj
dà — granda	huà — parolo, lingvo
dàibǎotuán — delegacio	huì — kapabli, scipovi
de — -a; vorteto uzata kun "shì"	jiǎng — paroli, diri
dì-yí cì — (je) la unua fojo	jiào — nomiĝi
dōu — tute	jiāotán — interparoli
duì — al, kontraŭ	jièshào — prezenti, konigi
fǎngwèn — viziti	jīxièshī — maŝinisto
fángzi — ĉambro, domo	jìzhě — ĵurnalisto
fēicháng — tre, eksterordinare	kěshì — sed
gāoxìng — ĝoji	kěyǐ — povi
gěi — doni; por, al	lái — veni
	liǎng-běn — du (libroj)
	ma? — ĉu

míngbái — kompreni  
 míngzi — nomo  
 nǎ — kiu (adj.)  
 nà — tiu, tiuj  
 nàxie — tiuj  
 nǐ, nǐde, — vi, via  
 nín, nínde — vi, via  
 (respekto)  
 qīng — bonvole  
 qīngzhù — celebri, festi  
 ràng — lasu  
 rén — homo  
 rènshi — koni  
 shēnfèn — persona  
 pozicio, rolo  
 shénme — kio  
 shì — esti  
 shìde — jes  
 shìjièyǔ — Esperanto  
 shuō-de — parolata  
 Sūlián — Sovetio  
 tā — li, ŝi, ĝi  
 tāmen — ili  
 tóngshì — kolego  
 tú — bildo, mapo  
 tuányuán — ano de  
 organizajo, kies titolo  
 finiĝas kun sufikso  
 “tuan”  
 túshūguǎn — biblioteko

wénhuàbù — Ministrejo  
 de Kulturo  
 wǒ, wǒde, wǒmen — mi,  
 mia, ni  
 xìngmíng — familia kaj  
 persona nomoj kune  
 yào — postuli, peti; voli;  
 bezoni  
 yāoqǐng — inviti  
 yě — ankaŭ  
 yǐ — kiel (jurnalisto  
 ktp.), en (la nomo de)  
 yì-běn, yige, yì-wèi —  
 unu (libro), unu  
 (objekto), unu (homo)  
 yìng — responde al,  
 kaŭze de  
 yīngyǔ — angla lingvo  
 yìyuán — interpretisto  
 yòngde — uzata  
 yóulǎn — turisma  
 zìjǐ — mem  
 zhǎo — serĉi, trovi  
 zhè — tiu ĉi, tiuj ĉi.  
 zhèxie — tiuj ĉi  
 zhīdào — scii  
 zhíyè — okupado, pro-  
 fesio  
 zhōngguó — Ĉinio  
 zhùde — loĝata

## Al niaj legantoj

Okaze de la nova jaro ni deziras al niaj legantoj feliĉon kaj novajn sukcesojn en Esperantaj kaj porpacaj laboroj. Samtempe ni esprimas nian koran dankon al tiuj, kiuj favoris nin en la pasinta jaro per alsendo de la enketlisto kaj leteroj, komunikante al ni siajn dezirojn, kritikojn kaj proponojn. Ĉio ĉi tio estas tre valora helpo al nia laboro. Inter tiuj deziroj, iujn ni jam plenumis de lastaj numeroj de EPĈ. Por pliaj ni ankoraŭ klopodos laŭeble en la estonto. Certajn dezirojn ni eble ne povos kontentigi en proksima tempo, sed ĉiuj faritaj rimarkoj havas nian plej grandan atenton kaj ni ĉiam volonte ankoraŭ aŭdos ĉiajn pliajn rimarkigojn de niaj legantoj.

De tiu ĉi numero ni denove skribas ĉinajn nomojn per Esperanta alfabeto laŭ certaj transskribaj reguloj. La novaj formoj iuokaze iom diferencigas de la ĝis nun uzitaj, sed ili estas facile prononceblaj por esperantistoj kaj evitas tro multe da intermiksiĝo de malsamaj ĉinaj sonoj. Ni esperas, ke la nova aranĝo kontentigos niajn legantojn.

— La Red.

## D-ro Todorov en Pekino

Bulgara esperantisto Doktoro Todorov, membro de bulgara higiena laborgrupo sendita al Vietnamio, sur la reirvojo al sia patrolando nin honoris per vizito en novembro, 1958.

Nia malnova amiko, kun kiu ni konatiĝis antaŭ unu jaro kiam li iris de sia patrolando al Vietnamio, ĉifoje denove nin kuraĝigis per fervoro kaj sperto en paca laboro pere de Esperanto.

Lia ĉeesto kaj tio de hungara kamarado Kiraly, kiu ankaŭ estas nia malnova amiko faris nian studrondon de 20 partoprenantoj rondo

internacia sed samtempe familia. Li vivece priskribis al ni pri la fervora laboro de la vietnamaj esperantistoj kaj la rapida disvolvo de Esperanta movado porpaca en Vietnamio. Esperanto ja estas la lingvo kiun li uzis tie en sia higiena laboro, ĝuste kiel k-do Kiraly en sia laboro por helpi trejnadon de manipulantoj de agrikulturaj maŝinoj en nia lando. Li konstatis, ke li multe progresis en parolo Esperanta dum sia laboro, kiel diras bulgara proverbo: “Bezono kreas majstron.” En Bulgario, li daŭrigis, Esperanta movado havas

bonan bazon, ĉar Esperanto de longe estas uzata en praktika revolucia batalado. Nombro de esperantistoj estas granda proporcie kun la loĝantaro. Esperanta movado jam estas vastamasa movado kaj la registaro taksas ĝin tute egale kun aliaj kulturaj aferoj. Ege favoraj estas la cirkonstancoj por Esperanto en Bulgario.

Ĉio kion li preparolis konvinke pravas, ke ju pli ni uzas Esperanton por valora laboro — por internacia kompreniĝo kaj amikiĝo, mond-paco, progreso kaj feliĉo de la homaro, des pli ĝi disvastiĝas.



# Korespondi deziras

**50 gekomencantoj** deziras kor. kun tutmondaj esp-istoj. USSR, Riga-centro, Raina bulv. 19-10, Universitata Esperanto-rondeto.

**J. A. Kiviluoto**, KUOPIO, Asuma, Finnlando, dez. kor. kun ĉinaj samideanoj.

**J. Qualters**, 49, Holden Crescent. Walsall. Staffs, Ang-

lujo, deziras kor. kun ĉinaj kaj Sovetiaj gesamideanoj pri ĉiuj temoj.

**Esperanto-Rondo ĉe mezgrada lernejo** deziras kor. kaj interŝanĝi bk. kun la tuta mondo. La lernejo ank-aŭ aranĝas konstantan ekspozicion de alsenditaĵoj. Adreso: USSR. Vilnius, Ŝermuŝkju, Srednjaja Ŝkola 20.

**Atentu!** Malnova k-do de 1917, sciigas iamajn korespondantojn pri ŝanĝo de sia nomo (Schuller Bela) je Sas. Ŝatus kor. kun seriozaj gekdoj diversteme. Adalberto Sas, Hungario, Budapeŝto, Fortuna-str. 4.

**A. P. Tomilov**, Azerbajĝano SSR., Baku 33, Montino, avia-gorok, d. 3, kv. 14.

**Karel Rybka**, Leninova 34, Svitavy, Ĉeĥoslovakio.

## AŬTO POR DEZERTO

En Hingiang - provinco oni fabrikis novan aŭton por uzado en dezerto. La nova aŭto estas provizita per aerhelico por bone kuri en dezerto.

## LA UNUA 10,000-TONELA ŜARGOŝIPO

Je la 27-a de novembro en la lasta jaro okazis en Dajren la surakviga soleno de la nove konstruita 10,000-tonela oceana ŝarĝoŝipo "Jaŭgin" (impeto). Ĝi estas la unua en sia speco laŭ grandeco konstruita en Ĉinio. La tuta longo estas 169,9 metroj. La ŝarĝa kapacito atingas 13,400 tunojn kaj la kunsarĝa pezo 22,100 tunojn. Ĝi havas altan rapidecon en veturado kaj estas provizita per glacirompilo, kaj la ekipaĵoj estas aŭtomataj. Se ĝi ekveturas de Ŝanhajo, ĝi povas rekte atingi iun ajn el la ĉefaj havenoj en la tuta mondo ne bezonante preni brulajojn dumvoje. La tuta laboro por konstruo de tia granda ŝipo daŭris nur 58 tagojn t. e. ĉirkaŭ triono de la tempo bezonata en Anglio.

## HAN-LINGVA ĴURNALO KUN FONETIKA SKRIBO

De oktobro, 1958 eldoniĝas semajna ĵurnalo "Hanyu Pinyin Bao". Ĝi estas redaktata paralele

per ideografoj kaj la nova fonetika skribo por provizi legajon al lernintoj de han-lingva fonetika alfabeto kaj samtempe helpi la lernadon de ideografoj kaj la komuna parola lingvo. Ĝi aperas ĉiusemajne kun formato de 27 × 39 cm. en 4 paĝoj.

## FLUOHALTIGO DE LA FLAVA RIVERO

Fluohaltigo de la Flava Rivero ĉe Sanmen-montgorĝo kiu estas la pivota laboro por jungi la riveregon, plenumiĝis je la 25-a de novembro lastjare 11 tagojn pli frue ol la difinita dato. Ekde tiam la ĉiam furioza rivero submetiĝas al homa volo kaj obeeme fluas tra la ambaŭflankaj fluejoj. Oni nun streĉe laboras super la kompletigaj konstruaĵoj.

## TRAKSTERNADO DE LANGŬ-KINGHAJ-FERVOJO

Laŭ plano, la traksternado de la fervojo de LangŬ en Gansu-provinco al Kinghaj-provinco komenciĝos nur en 1959, sed dank' al la alta laborentuziasmo de la konstruantoj ĝi komenciĝis jam en novembro 1958.

## KAŬĈUKA LAGRO

En Sud-ĉinia Kemiindustria Kolegio oni sukcesis fabriki kaŭĉukan lagron por ŝipoj. Ĝi

estas elasta, fortika kaj rezistema kontraŭ frotado, malsekeco kaj korodo. La rompiĝemon kaj neperfektan fermon kontraŭ akvo ĉe ordinariaj lagroj estas forigitaj. Per tiuj kvalitoj ĝi povas bone protekti la ŝipon.

## SCIENCO DE FLEGADO LAŬ ĈINA MEDICINO

Ĉina tradicia medicino multe kontribuos al medicina scienco ne nur en la diagnozo kaj kuracado sed ankaŭ en flegado. Por tion resumi kaj disvastigi, la medicinaj laborantoj en Nankina Ĉin-medicina Kolegio kolektive verkis libron "Scienco de Flegado laŭ Ĉina Medicino". La verko ampleksas pli ol 300 mil vortojn. Ĝi estas dividita en du partoj. La unua enhavas ĝeneralajn traktatojn pri fundamentaj teorioj de ĉina medicino, pri flegado ĝenerale kaj pri procedoj de 13 diversaj terapioj; la dua parto traktas la klinikajn sciindaĵojn kaj flegteknikon de 128 apartaj malsanoj.

## KOREKTO

Sur paĝo 199 de nia revuo en 1958, en malsupra parto, la daton "1953" en linio 1 de malsupre, maldekstra kolono, kaj linio 7, dekstra kolono, oni legu "1935".



## SUR NIA LIBROBRETO

**Geraldo Mattos: LA TENTO DE LA JUNULINO** — broŝuro de originala poemo, 11.5 × 16 cm., 18 paĝoj; eldonis: Kultura Kooperativo de Esperantistoj (adr.: poŝtkesto 3677, Rio de Janeiro, Brazilo. — 1953)

**Geraldo Mattos: IVAN LA SESA** — originala kvinakta historia teatraĵo, broŝuro 12.5 × 18 cm., 144 paĝoj, eldonejo: same kiel la supra. (1953)

**Geraldo Mattos: LA NIGRA SPARTAKO** — originala novelo, broŝuro, 11.5 × 16 cm., 76 paĝoj, eldonejo: Esperantista Libro-Instituto (adr.: poŝtkesto 2552, Curitiba, Parana, Brazilo. — 1955)

Kun plezuro mi legis la suprajn 3 originalajn verkojn de la sama aŭtoro. La unua estas poemo kun 384 versoj. Ĝia temo estas prenita el “Mia Penso” la fama poemo de D-ro L. L. Zamenhof, celanta priskribi la konflikton en la animo de la revema junulo Zamenhof en 1880.

La dua estas teatraĵo en versoj, bazita sur la tragedia vivo de Ivan VI, rusa caro en la jaroj 1740-1741. Post lia detroniĝo oni lin enkarcerigis kaj fine mortigis en 1764.

La lasta estas novelo priskribanta la ribelon de negroj ĉe la fino de la 16-a jarcento kontraŭ la sklavigo, perforto kaj krue-lajoj de la blankaj aventuristoj-koloniistoj en Sud-Ameriko.

Estas rimarkinde, ke ĉiu el la tri estas originala verko. Tio

donas specialan plezuron en la legado. Krome pli kaj pli maturas la literatura talento de la aŭtoro. Kiel oni vidas, ke la tri verkoj aperis en preskaŭ sinsekvaj du jaroj 1953 kaj 1955. Sed ĉiu sekvanta rikoltas pli grandan sukceson.

La trian “La Nigra Spartako” mi plej alte taksas, kaj enhance kaj lingve. La aŭtoro en tiu verko ne nur daŭrigas sian lingvan maturecon donante poeziajn kolorojn al prozaj priskriboj, kiuj tre reliefe prezentis la figurojn; sed ĉefe la realisma sintenado de la aŭtoro al historiaj eventoj ebligis lin senkompate malkaŝi la “civilizacion” de la koloniistoj kaj sklavigistoj.

La aŭtoro estas juna, tamen lia sukceso estas okulfrapa. La vojo de li sekvata povos konduki lin al vere altvaloraj verkoj en kiuj oni vidos ne nur lingvan majstrecon sed ankaŭ grandan realisman verkiston. La du eldonejoj ŝajne bone komencis sian laboron per tiaj eldonaĵoj. Mi avidas de ili legi pluajn bonajn verkojn. (H.)

### Ivo Lapenna: **RETORIKO KUN APARTA KONSIDERO AL ESPERANTLINGVA PAROLARTO**

— originale verkita, dua eldono reviziita kaj kompletigita, 19½ × 14 cm., 294 paĝoj, kun bela kovrilo. Prezo: bindita 22 ŝilingoj; broŝurita, 18 ŝilingoj. Havebla ĉe UEA.

Jen nova originale reviziita Esperanta libro. La enhavo

estas dividita en du partoj: La unua parto pri lingvo, en kiu la aŭtoro resumas diversajn lingvajn teoriojn. Al internacia lingvo, ĝi donas apartan ĉapitron. La dua parto pri retoriko, do la ĉefa parto de la libro. Ĝi traktas pri diversaj flankoj necesaj por oratoroj, kiuj volas bone sin esprimi kaj konvinki la publikon.

La aŭtoro kolektis riĉajn materialojn kaj ilin bone ordigis en sia pensfluo. La lingvo estas flua, viveca sekve ankaŭ elokventa.

Esperantistojn certe interesas precipe la unua parto, kvankam tion oni ne atendas en tia verko. En tiu ĉi parto la aŭtoro citis kaj komparis diversajn lingvajn teoriojn de la ekzisto, evoluo, formiĝo de komunaj lingvoj kaj precipe pri internacia lingvo. (H.)

### **SKIZO PRI VIETNAMIO** —

broŝuro tradukita kaj artaranĝita de Nguyen Minh Kinh, formato: 11 × 17 cm., 28 paĝoj, kun 5 kliŝoj kaj mapo de Vietnamio, eldonita de la Ŝtata Fremdlingva Eldonservo. Prezo: 2 rkp., ricevebla ankaŭ kontraŭ samkostaj E-libroj. Ĉion petu de Vietnamia Pacdefenda Esperantista Asocio, 15 Tô Hiên Thanh, Hanoi, Vietnamio.

Tiu ĉi broŝureto estas la unua E-eldonaĵo el Vietnamio. Ĝi skizas pri geografio, historio, politiko, kulturo kaj ekonomio de Vietnamio kaj kun kromaj paĝoj de E-movado en tiu lando. Legante la libreton oni ricevis klaran bildon ne nur pri la pasinteco sed ankaŭ pri la nuntempo de la demokratia respubliko, kiu longe batalis kontraŭ koloniistoj por sia sendependeco. Estas rekomendinde al ĉiuj esperantistoj kiuj interesiĝas pri vietnama popolo kaj prospero de ĝia E-movado. (A.)

# ATENTU! BALDAŬ ELDONIĜOS!

## ★ MI VOLIS VIZITI LERNEJON

82 p. 17.6 × 12.8 cm., kun multkolora kovrilo  
Bildrakonto pri vivo de malriĉa kamparanido.

## ★ LA POŝTMARKOJ DE ĈINA POPOLA RESPUBLIKO

Ilustrita katalogo de ĉinaj p.m. emisiitaj post la liberigo kun historia resumo pri la ĉina poŝto.

## ★ POR NOVA AFERO, NOVA MANIERO

11 noveloj de nuntempaj verkistoj reselektitaj el la aperintaj kolektoj "LA FELIĈO" kaj "POR NOVA AFERO, NOVA MANIERO"



MI VOLIS VIZITI LERNEJON

ĈIUJ MENDEBLAJ ĈE  
ĈINA ESPERANTO-LIGO

*Legu . . .*



— bele ilustrita monata gazeto anglalingva —

ARTIKOLOJ pri agrikulturo, industrio, komerco, eduko, religio, artoj, socia bonstato kaj ĉiutaga vivo de la 600 milionoj da ĉinaj popoloj

RUBRIKOJ pri komerco, kulturaj aferoj, ĉinaj poŝtmarkoj, kuirarto, ĉina lingvo, sporto, virinoj, infanoj ktp.

SUPLEMENTOJ trifoje en ĉiu jaro

KOVRILOJ KAJ BILDPAĜOJ en multaj koloroj

Eldonas: La Ĉina Bonstatiga Instituto, Soong Ching Ling (S-ino Sun Yat-sen), prezidanto

*Abonu ĉe via librejo au rekte skribu al:*

**CHINA RECONSTRUCTS, Wai Wen Building, Peking (37), China**

*(Proveksempleroj sendiĝos al ĉiu petanto)*

